

ESPERANTO

J U N I O 1 9 6 0

53 a Jaro — N-ro 655 (6)



esperanto

JUNIO 1960

53a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 655 (6)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1960) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO :

La Urbodomo de Bruselo (vidu p. 101-117).

Enhavo

Nia 45-a en Bruselo	101
Sin deklari	101
La Principaro de Frostavallen	102
La Nederlanda Peticio	102
Frederik Chopin	103
UK 1962	118
Granda Esperanto-Ekspozicio	104
38-a Int. Foiro de Padova	104
La eŭropa epoko de Esperanto finiĝis	105
Komisiono por ordigo de geografiaj nomoj	106
Ambasadoroj	106
Por korekta Esperanto	108
Volapük kaj Esperantologio	115

Rubrikoj :

Ŝaka rubriko	107
La Internaciaj Konkursoj	107
Krucvortenigmo	108
La Juna Vivo	109
Tra la Mondo	110
Esperantista Vivo	111
Nekrologo	111
Belartaj Konkursoj 1959	112
Novaj libroj	116
45-a UK	117
Radio	118
Oficiala Informilo	118

Manuskripto por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Nia 45-a en Bruselo

Sin Deklari

Kiam mi, je la fino de la lasta ĝenerala kunsido, dum la 44-a U.K. en Varsovio, alparolis la kongresanaron kaj, kiel prezidanto de la L.K.K. por la venonta Kongreso, invitis ĉiujn veturi tiun ĉi jaron al Bruselo, mi substrekis jam kelkajn el la fundamentaj diferencoj, kiuj ekzistos inter ambaŭ Kongresoj.

En 1959, ni iris al lando vasta, al urbo, kiu multe suferis, kaj ankoraŭ flegas siajn vundojn. En 1960, ni invitas al lando malgranda; al urbo, kiu, pro feliĉa hazardo, fakte ne suferis pro la milito.

En 1959, niaj laboroj okazis en vasta Palaco, kies turkonstruaĵo estas videbla jam de ekster la urbo. En Bruselo, la nova Kongrespalaco, tamen tre trafa kaj funkicela, preskaŭ kaŝiĝas en la deklivo de la Art-Monteto, kiu ligas la suban kaj la supran partojn de la urbo; kaj ĝiaj salonegoj parte perdiĝas en la subtero de la deklivo, kiu estas kovrita per trafikaj ĝardenetoj terasformaj, ornamitaj per fontanoj kaj akvoŝprucoj kaj kun multaj benkoj, kiuj faciligos kaj pliagrabiligos la renkontiĝojn.

Ĝi do ne, kiel la Kulturpalaco de Varsovio, kun sia multnombra flagaro meze de senlima Placo, de malproksime jam altiros la atenton de la preterpasantoj. Sed, lokiĝanta tute centre, je nur kelkaj paŝoj de la Centra Stacidomo, ĝi estas perfekte adaptita al la bezonoj, ĉiam kreskantaj de Kongreso, kiel la nia. Kun siaj kvar etaĝoj, ĝi estas speciale komforta por ĉiuj laboroj kaj servoj kaj por gastigi internaciajn manifestaciojn kiel la nia kaj kiel preskaŭ daŭre okazas en la belga ĉefurbo. Ĝi estas ekipita per bufedo kaj per poŝt- kaj bank-oficejoj kaj per ĉiaj modernaj akcesoraĵoj bezonataj de granda Kongreso.

Kaj, en tiu Kongresejo, miaj kolegoj de la L.K.K. nunmomente aranĝas por vi programon, kiu, post la granda jubilea kaj festa Kongreso de Varsovio, tute ne celas al ne-imitebla pompo kaj lukso, sed en kiu estos strebata la atingo de vivanta kaj kiel eble plej altnivela Kongreso, en kiu ĉiu partoprenanto trovos ĝuon kaj la eblecon ankaŭ plene realigi sian esperantistecon.

Ni, ekzemple, havos penson por la edzinoj kaj gefiloj de kongresanoj, kiuj ne ĉiam emas ĉeesti la laborkunsidojn, kaj kiuj tiel troviĝas momente senokupaj kaj, ni diru, iomete forlasitaj.... Por ili okazos senhaltaj prezentadoj de dekkvino da artaj turismaj filmoj, grandparte en koloroj, kies sinkronizon en Esperanto prizorgis la grupoj de Antverpeno, Bruĝo kaj Bruselo.

Krome okazos kompreneble ĉiuj programeroj, jam kutime enlistigitaj en antaŭaj Kongresoj: belegaj ekskursoj al Antverpeno, Bruĝo, Charleroi, Gento, Lieĝo, Namuro kaj la Ardenoj; Teatra Prezento, fare de la Arta Teatro de S-ro Flego; Interkona, Muzika kaj Junula Vesperoj; Somera Universitato kaj Cseh-Seminario; Oratora kaj Belarta Konkursoj; Blindula Kongreso; ĝeneralaj, sekciaj kaj fakaj kunsidoj kaj, por la unua fojo: Ekzameno por lingvokapableco; kiuj ĉiuj tamen ne povas forgesigi al mi, speciale citi la Infankongreseton, kiu havos ĉies plej grandan zorgon kaj por kies plena sukcesigo la L.K.K. kreis la Adoptan Patrecon, kiu permesos inviti, el malproksimaj landoj, infanojn meritplenajn.

Estas al tiu ĉi kaj al tia nova renkontiĝo grandioza, ke ni invitas vin: Jam pli ol 1.500 kongresanoj ensendis sian aliĝon. Ne hezitu kaj precipe ne prokrastu; ne plimalfaciligu la taskon de la organizantoj kaj ne endanĝerigu la ĝuon de la aliaj kongresanoj, per tro malfrua aliĝo!

Rapidu! Kaj estu bonvenaj en Bruselo!

Maurice Jaumotte

Movado kiel la nia, kiu sin turnas al la plej larĝaj amasoj, nature altiras ĉiaspecajn elementojn: de la plej seriozaj personoj alte respektataj en siaj medioj ĝis individuoj konsiderataj kelkfoje de la socio kiel veraj stranguloj. Verŝajne tio ne estas evitebla. Kaj ankaŭ per si mem ĝi ne estas tre danĝera, se regas taŭga proporcio.

La malbono komenciĝas kiam tiuj stranguloj donas sian stampon al la koncerna movado. La publiko bedaŭrinde plej ofte juĝas la aferojn ne laŭ ilia efektiva valoro, sed laŭ iliaj videblaj protagonistoj. Kaj — denove bedaŭrinde — plej rimarkeblaj estas kutime tiuj, kiuj per sia strangeo elvokas la atenton aŭ prezentas konvenan objekton de ŝercoj.

Estis tempo kiam tiaspecaj stranguloj vere abundis en la Esperanto-Movado precipe de kelkaj landoj. Per siaj fantaziaj vestaĵoj, amaso da verdaj steloj sur ĉiuj korpopartoj, nekutima sinteno kaj altruda konduto ili kompromitis, kelkfoje tre profunde kaj preskaŭ neripareble, la aferon al kiu ili, eble sincere, deziris servi. Eĉ pli, precize tiuj elementoj kaŭzis, ke seriozaj personoj komencis aŭ forlasi la Esperanto-Movadon, aŭ, se ili restis en ĝi, kaŝi eĉ sian scion de la Internacia Lingvo en la medioj ekster la Movado. Tio siavice kreis ankoraŭ pli da malbono, ĉar, almenaŭ ŝajne, la balanco estis komplete renversita kaj oni povis ricevi la falsan impreson pri tre neoportuna konsisto de la Esperanta lingva kolektivo.

La situacio ankaŭ tiurilate multe pliboniĝis en la lastaj jaroj kaj nun ĝi estas tute kontentiga. Diversaj stranguloj preskaŭ malaperis el la vicoj de la organizita neŭtrala Esperanto-Movado. Ĝi ne nur reakiris sian dignon, sed eĉ konsiderinde altigis sian prestiĝon.

Tamen, multaj elstaraj esperantistoj — verŝajne timante personan kompromitiĝon pro la iamaj malagrablaj spertoj — ankoraŭ

kaŝas sian esperantistecon. En la medioj de ilia laboro aŭ agado neniu scias, ke ili parolas la Internacian Lingvon. Nun tutcerte ne plu estas kaŭzo por agi tiel. La interesoj de la plua disvastigo de la lingvo postulas, ke ĉiu serioza

esperantisto ne hezitu deklari sin tia, kiam ajn por tio montriĝas okazo. Tion oni povas fari, ekzemple, portante ĉiam la insignon, uzante la lingvon en internacia korespondado kaj dum eksterlandaj vojaĝoj, atentigante pri la

lingva problemoj kaj taŭge eksplikante la solvon, kiun prezentas Esperanto. Pledo por la Internacia Lingvo fare de persono respektata en sia medio estas la plej efika rimedo por la plua disvastigo de Esperanto. D-ro Ivo Lapenna

La Principaro de Frostavallen

La kunveno pri informado, okazinta en Frostavallen en la pasinta aŭgusto, rekonfirmis la Fundamentan Principaron de Informado pri la Internacia Lingvo, akceptitan en julio 1956.

Tiu kunveno ankaŭ konstatis, ke bedaŭrinde kelkaj punktoj de la Principaro ankoraŭ ne estas sufiĉe rigore observataj. Tial ĝi decidis rekomendi al la tuta Esperanto-gazetaro diskonigi kiel eble plej vaste la tutan Principaron, aŭ almenaŭ kelkajn ĝiajn plej gravajn partojn.

Konforme al tiu sugesto ni ankoraŭfoje publikigas kelkajn punktojn, kiuj rilatas ĉefe al la kvalito de informado. La Estraro petas ĉiujn esperantistojn, sed precipe tiujn, kiuj agas sur la kampo de informado, atente observi la principojn en sia agado:

KVALITO

Ĉefaj eraroj:

- Nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ La Internacia Lingvo aŭ Esperanto;
- superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo;
- ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili;
- uzi en nacilingvaj tekstoj esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k.s.;
- skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo;
- nomadi la informadon pri Esperanto „propagando“;
- doni al la Esperanto-Movado sektecan karakteron (tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.). La eraroj en la informado malproksimigas de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitiĝon de la movado en multaj medioj. Por altigi la kvaliton estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la lingvo: literaturo, sciencaj verkoj, ISU, Belartaj konkursoj, delegita reto, precipe helpo dum vojaĝoj kaj en profesia laboro. La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj respegulu la respekton, kiun la esperantistoj mem havas por la Internacia Lingvo.

KONKLUDO

La esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la praveco de la propra afero kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ la eraraj prezentoj. Ĉiu esperantisto konstante klopodu larĝigi kaj altigi sian lingvan scion. Ĉiu esperantisto ĉiam portu la Esperantan insignon (ne multajn, sed unu). En fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj la esperantistoj levu sian voĉon. La informado estu ĉiam adaptita al la medio, en kiu

oni faras ĝin, kaj venu prefere de tiu medio mem. Ĉiuj branĉoj de informado estu egale atentataj kaj paralele aplikataj. La maniero de informado varias de unu lando al la alia kaj de unu medio al la alia. Sekve, tiuj ĉi bazaj principoj estu aplikataj kun elasteco kaj kun konsidero de la apartaj cirkonstancoj. La tuta agado, paralela kaj harmonie kunordigita en la tuta mondo, havu daŭre la celon diskonigi la lingvon, instigi al lernado kaj praktika aplikado de Esperanto, venki la ŝlosilajn poziciojn en la kultura vivo kaj definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

LA NEDERLANDA PETICIO TRANSDONITA

Kiel estis raportite en la aprila numero 1960 de "Esperanto", la Oficejo "Esperanto en la Instruado" en Nederlando direktis sin al la Instrumministro kun kelkaj petoj koncerne la instruadon de la Internacia Lingvo en la elementaj lernejoj. En la menciita Oficejo estas reprezentitaj ĉiuj instruistaj unuigoj kaj ĉiuj esperantistaj organizaĵoj en la lando.

Okaze de pli frua sinturno estis ricevita de alta funkciulo la respondo, ke deziro koncerne Esperanton devus vivi en la popolo. Tial la Oficejo serĉis kaj trovis apogon en la popolo kolektinte runde 812.000 subskribojn sub peticio direktita al la registaro. Ĝi enhavas la peton malfermi la elementajn lernejojn por fakultativa instruado de Esperanto kaj doni al la Esperanto-diplomo la saman valoron kiel al tiuj pri elementa instrukapablo por aliaj lingvoj.

Kvankam preparaj traktadoj kun la Ministro kaj aliaj registaraj funkciuloj jam okazis, la 16-an de majo pasintan la peticio estis oficiale transdonita al lia Ekscelenco



La transdono de la peticio



Fragmento de la memorŝtono
de Frederik Chopin en Dusziki-Zdroj.

Tiu ĉi frazo verdire entenas la tutan homan, artan kaj historian veron pri la vivo de homo kaj pri la krea verko de Frederik Chopin. Laŭ naskiĝo varsoviano, laŭ koro polo, Frederik Chopin fariĝis en la daŭro de 150 jaroj depost sia naskiĝo unu el la grandaj kaj plej veraj civitanoj de la tuta mondo. Al la propra patrujo li transdonis la grandiozon de sia muzika genio, kaj al la mondo la tutan polecon de sia muziko kaj ĝian nerezisteblan belecon. En la historio de la monda muziko li estas unu el la plej grandaj romantikistoj, en la historio

Frederik Chopin

*"Laŭ naskiĝo — varsoviano,
laŭ koro — polo,
laŭ talento — civitano de l'mondo".*

Kamil Cyprian NORWID (fama pola poeto)

de la pola arto li plenumis la rolon de tiu kreinto, kiu plej bone komplete kaj plej riĉe scipovis transdoni kiel proprajn al la homaro la torenton de pola muzika imago.

La muziko de Chopin fakte ne bezonas jubileojn, nek propagandon. Ĝi mem propagandas sin kun sufiĉa forto per propraj valoroj. La Chopin-Jaro havas tamen la celon substreki tiun ĉi plej esencan trajton, kiun tiu muziko plenumas — tiun civitanekon de l' mondo, la kapablon transpaŝi ĉiujn limojn kaj trastreki ĉiujn diferencojn inter la homoj komprenantaj ĝian belecon. En tiu jaro Pollando, pli vaste ol iam ajn, volas transdoni al la muzikologia scio, al la rekrea arto kaj al ĉiuj amantoj de la muziko de Chopin siajn librojn, dediĉitajn ne al memoro, sed ĝuste al la viva verko de la komponisto.

Kvar ĉefaj eventoj de la Chopin-Jaro estas: *Pianista Konkurso, Muzikologia Kongreso, nacia eldono de ĉiuj verkoj kaj surdiskigo de ĉiuj verkoj de Chopin.*

Walerian W. Włodarczyk

G. C. Stubenrouch, Ŝtatsekretario pri la elementaj lernejoj. Okazis mallonga ceremonio en la Ministerio en Hago, al kiu estis invititaj pluraj funkciuloj el instruista kaj esperantista medioj, inter kiuj lastaj la Prezidanto de la Akademio kaj la Direktorino de la C.O. de U.E.A.

S-ro A. M. D. Korff, Sekretario de la Oficejo "Esperanto en la Instruado" en mallonga parolado klarigis la dezirojn esprimatajn en la petskribo. Malgranda delegacio de infanoj el Hago kaj Haarlem, nuntempe lernantaj Esperanton, direktis kelkajn vortojn en Esperanto al la Ŝtatsekretario kaj transdonis la peticion aranĝitan en dosieroj kiuj kune formis la nombron 812.000 de la subskriboj.

La Ŝtatsekretario en sia respondo montris sian simpatian por la iniciato, sed akcentis ke la decido apartenas al la Parlamento.

Direktorino de la C.O.

Universala Kongreso 1962

Neniu invito ankoraŭ atingis la Estraron de U.E.A. koncerne la 47-an Universalan Kongreson de Esperanto en aŭgusto 1962. La lokaj societoj kaj Landaj Asocioj interesitaj pri kandidatiĝo estas petataj skribi al la Ĝenerala Sekretario de U.E.A., Prof. D-ro Ivo Lapenna, 77, Grasmere Av. Wembley, Mddlx., Britujo ĝis la fino de novembro 1960.

Granda Esperanto-Ekspozicio

en

Johannesburg, Sud-Afriko

La 11-an de aprilo en Johannesburg, la plej granda urbo en Sud-Afriko, ampleksa Esperanto-ekspozicio aranĝita de la Johanesburga Esperanto-Societo estis oficiale malfermata de la Urbestro de Johannesburg, kons. Alec Gorshel. La urbestro komencis sian paroladon en preskaŭ perfekta Esperanto, kvankam li nur ekstudis la lingvon speciale por la okazo. Li esprimis la opinion, ke Esperanto estas ege bezonata por kulturaj interrilatoj kaj internacia kompreno. Li mem volas daŭrigi la studon de la lingvo. Li subtenas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Kvankam estas malfacile persvadi edukajn instancojn aldoni novan studtemon al jam plenplena temaro, tamen Esperanto efektive ŝparus tempon, kiun oni nun povas fordoni al la studo de aliaj lingvoj.



Angulo de la ekspozicio. La granda mondmapo montras lokojn, kie troviĝas U.E.A.-delegitoj.

La ekspozicio okazis en la granda enireja salono de la Urba Biblioteko kaj daŭris de la 11-a ĝis la 29-a de aprilo. Dum tiu tempo multaj homoj el ĉiuj partoj de Sud-Afriko vizitis la urbon por ĉeesti la Unio-Ekspozicion, grandan komercan foiron, kiu ĉi-jare havas specialan signifon pro la jubileo de la fondo de la Unio de Sud-Afriko. La Esperanto-Ekspozicio estis videbla al ĉiuj, kiuj vizitis la bibliotekon aŭ la faman Afrikanan Muzeon troviĝantan en la sama konstruaĵo. Oni taksas, ke dum la daŭro de la ekspozicio proks. 8000 homoj vizitis la Bibliotekon. La ekspozicio plenigis 9 vitrinojn kaj 30 kv. metrojn da montrotabuloj, kiujn disponigis al J.E.S. la biblioteka instanco. Kun tiom da spaco estis eble fari vere imponan ekspozicion de Esperanto-libroj, afiŝoj, broŝuroj kaj aliaj objektoj, certe preskaŭ la plej grandskala ekspozicio iam prezentita en Sudafriko.

Du tagojn antaŭ la malfermo de la ekspozicio, ĝi estis antaŭanoncita per kvin-minuta radio-intervjuo inter la populara radio-parolisto Percy Baneshik kaj du esperantistoj — blinda esperantistino Betty Kreuger el Kapprovinco, kies vizito al Johannesburg feliĉe koincidis kun la malfermo de la ekspozicio, kaj Edward W. Woodruff, ĉefdelegito de U.E.A. Bonaj raportoj pri la oficiala malfermo aperis en la ĵurnaloj kaj disaŭdiĝis per la radio.

La ekspozicio fakte altiris multan intereson kaj kiel sekvo la Witwatersrand Technical College, granda registara teknika altlernejo, konsentis aranĝi Esperanto-kurson por komencantoj. Ĉi tiu estos la unua Esperanto-kurso okazonta en registara lernejo en la Transvalprovinco.

E. W. Woodruff

38-a Internacia Foiro de Padova

De la 29-a de majo ĝis la 13-a de junio 1960, en areo de 102.000 kv. metroj, okazos la 38-a Foiro de Padova, kun partopreno de ĉ. 3.500 aliĝintoj, el kiuj pli ol mil estas eksterlandaj firmoj.

El la antikva "Foiro de S. Antonio" (1257) naskiĝis la nuna Internacia Foiro (1919) kiu, pro geografia kaj ekonomia situo, evidentiĝas kiel tre favora merkato speciale rilate al centro-orientaj eŭropaj landoj kaj al landoj de Meza-Oriento kaj Danub-baseno.

Krom ĝeneralaj industriaj, meĥanikaj, agrikulturaj

varoj estas speciale pritraktataj en la Foiro: enpakigo — malvarmigo — en-uzinaj transportiloj — koloro kaj farboj — plastikaj materialoj — urbaj servoj; pri tiuj specialaĵoj oni aranĝos kunvenojn kaj internaciajn kongresojn kun apartaj studoj kaj elprovoj k.t.p.

La nunaj tute favoraj cirkonstancoj, eme al venko de politikaj baroj kaj al fortigo de ekonomiaj fortoj, ebligas kaj invitas la industriajn kaj komercajn interesulojn al partopreno kaj vizito de la Foiro de Padova, kies Inform-Oficejo plezure donas ĉiujn sciigojn.

La eŭropa epoko de Esperanto finiĝis

Kiam la potenca roma imperio fine pereis, el ĝiaj ruinoj ekaperis novaj memstaraj ŝtatoj: Britujo, Francujo, la germanaj ŝtatoj kaj aliaj.

Hodiaŭ ni povas konstati, ke pro similaj kaŭzoj formiĝis Hindujo, Pakistano, Israelo, Koreo, Vietnamo, Ganao ktp.

Tiu procedo ankoraŭ ne finiĝis. Certe ni iom post iom povos noti la fondiĝon de pli da ŝtatoj, kies enloĝantoj deziras vivi sian propran senjungan vivon.

Tiuj novaj ŝtatoj ne havas tradiciojn, kiuj ligas iliajn farojn, kaj ĉe ili la antaŭjuĝoj ne ludas fundamentan kaj decidigan rolon, kiel ofte okazas en la malnovaj t.n. kulturŝtatoj.

Ni povas diri, ke tiuj novaj ŝtatoj estas "serĉantoj", kiuj estas konvinkitaj pri la benoj de la libereco, sed kiuj ne ankoraŭ havas firmajn normojn por sia agado. La diplomatio ekzemple ne ludas la unuan violonon. Iliaj reakcioj ne dependas de centjaraj, hereditaj vidpunktoj kaj konsideroj, sed estas sinceraj kaj spontaneaj, naskitaj el freŝaj spertoj, kombinitaj kun bona volo en moderna medio, do en intima kontakto kun la nuno kaj proksime al la estonteco.

Hodiaŭ observinda fakto estas, ke la grava faktoro de la politiko de iu lando estas la konceptoj, vidpunktoj kaj prijuĝoj de la popolamasoj.

Politikaj kaj ekonomiaj demandoj kompreneble regas la interesojn kaj estas gravaj ĉiurilate, sed saĝe ni agas, se ni ne forgesas la kulturajn demandojn. Tie oni ofte eraras.

Mi kredas, ke oni ne erarante povas diri, ke oni nuntempe havas la koncepton, ke oni ne konkeras la politikan aparaton per frakasado de la popolo. Tiu metodo estas malmoderna kaj en la daŭro de la tempo ne rezultodona. Oni devas konkeri la konfidon de la amaso de interne, ĉar la individuo, liaj pensmaniero, agadprogramo kaj volodirekto finfine estas plej gravaj.

Ni esperantistoj ne estas persone politike neŭtralaj, ĉar ni havas niajn politikajn opiniojn kaj idealojn, ni subtenas ofte kontraŭajn ideologiojn, sed kiel esperantistoj ni devas neŭtrale plani kaj provi komune trovi la elementajn kondiĉojn por disvastigo de nia lingvo en la interpopola kunagado.

Kaj nun mi revenas al tio, kion mi pritraktis ĉi supre rilate al la novaj ŝtatoj, kiuj avide kaj sencere monie volas havi bonan lokon inter la malnovaj ŝtatoj.

Ni esperantistoj devas atente aŭskulti la voĉojn de la popolo, ni observu la pensojn kaj sentojn. Ni

registru tion, kio sin movas ĉe la simplaj civitanoj.

Tiuj novaj ŝtatoj havas malsimilajn lingvojn — ofte multajn, kaj iliaj vivositacioj estas tre malsamaj — sed ĉiuj deziras vivi — kaj vivi hodiaŭ signifas kunlaboron.

Kunlaboro estas ebla nur baze de reciproka interkompreno, kaj la homoj komprenas unu la alian nur, se ili lingve kapablas informi unu la alian pri siaj vidpunktoj kaj proponoj.

Jen Esperanto havas sian ŝancon, kiun ni ne hezitu tuj ekkapti, kaj necesas forĝi, kiam la fero estas varma, ĉar la tempo rapide rajdas, kaj tiu, kiu estas postlasita, estas perdita. Kiam nova ŝtato jungis sin al metodo kaj komencis fosi novan sulkon, tiam estas tro malfrue vekti atenton kaj krei intereson pri io alia.

Ni devas agi nun. Ni devas hodiaŭ trovi la vojojn kaj metodojn, kiuj kapablas veki la intereson pri Esperanto ĉe tiuj popoloj kaj nacioj, kiuj serĉas sian vojon al la estonteco.

La eŭropa epoko de Esperanto finiĝis. La aliaj kontinentoj vokas nin. Tio, kion ni ĝis nun idee komprenis kaj teorie diskutadis, devas transformiĝi en konkretajn agojn.

Haudebine en Hindujo estas virineto en hommaro, sed ŝi reprezentas la novan kaj urĝan en la Esperantomovado de la nuno.

Nia klopodado devas nun esti sendi esperantistojn al ĉiuj novaj ŝtatoj por tie prepari la terenon.

Tiuj niaj komisiitoj estas portantoj de tio, kio latente vivas sur la fundo de la popolanimo: la homa deziro havi instrumenton, kiu frakasas la izolecon kaj malfermas la larĝajn vojojn al kunlaborado sub tute samaj kondiĉoj.

Oriento estas Oriento kaj Okcidento estas Okcidento — tiuj du neniam renkontiĝas, estas tezo, formulita de Kipling, kaj ĝis nun fakte estis tiel, ke la eŭropa hegemonio kreis abismon inter la du.

Hodiaŭ tiu frazo estas absolute malmoderna, kaj neniel ĝi korespondas kun la situacio, en kiu la homaro sin trovas.

Pere de Esperanto ni povas doni al Oriento kaj Okcidento facile uzeblan instrumenton, kiu proksimigas ilin unu al la alia. La rolo de Esperanto en la nuna mondsituacio estas pli grava ol iam en la varia historio de la Zamenhofa geniaĵo. Ni ne povas pli efike kaj pli bone festi la 100-jaran datrevenon de Zamenhof ol per praktikaj faroj, kies rezultoj plenigas la abismon inter Okcidento kaj Oriento.

Einar Dahl

KOMISIONO POR ORDIGO DE GEOGRAFIAJ NOMOJ EN PLENA LABORO

La longe kaj zorge antaŭpreparita Komisiono por ordigo de Geografiaj Nomoj ricevis sian definitivon formon dum la Varsovia Kongreso, kaj ekde tiam intense laboras.

Partoprenas la Komisionon 13 kompetentuloj elektitaj inter la membroj de la Akademio, kiuj interesiĝas pri geografio, kaj membroj de la Internacia Geografia Asocio, kiuj interesiĝas pri la lingva problemo. Prezidas la Komisionon la Prezidanto de la Akademio, Inĝ. J. R. G. Isbrucker, kaj la Prezidanto de IGA, Lic. Tibor Sekelj, kiu estas samtempe la koordiganto-afergvidanto. La ceteraj membroj de la Komisiono estas: S-ro M. C. Butler, (Anglujo), S-ro F. A. F. Faulhaber (Nederlando), D-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Prof. N. Kawasaki (Japanujo), S-ro I. Krestanov (Bulgario), D-ro J. M. Mabesoone (Nederlando), S-ro M. Salzmann (Francujo), S-ro J. R. Scherer (Usono), Mag. V. Setälä (Finnlando), Doc. Støp-Bowitz (Norvegujo), S-ro A. W. Thomson (Anglujo).

La juna Komisiono jam funebras la forpason de sia membro, la akademiano s-ro F. Ellersiek.

Post malpli ol unujara laboro ni povas anonci la ĝojigan fakton, ke la ĉiuflanka pridiskuto de la problemo alportis interkonsenton kun plimulto de voĉoj pri la du bazaj principoj, kiuj gvidos la Komisionon. Jen la principoj:

1. *La geografiaj nomoj estos esperantigitaj laŭ ortografio, elparolo aŭ signifo, en ĉiu individua kazo, konsiderante la internacian uzon, kaj la jam akceptitan praktikon.*

Tiu ĉi principo koncernas unuavice la nomojn de la geografiaj objektoj kun certa internacia graveco, dum la ceteraj estos esperantigitaj laŭgrade, laŭ bezono.

2. *La landnomoj sekvas ĝenerale la principojn starigitajn de d-ro Zamenhof: divido en radikoj geografiaj kaj radikoj gentaj, kun sufikso -uj. Tamen, pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj tiuj ĉi principoj ne estu rigidaj, sed sufiĉe liberalaj, tiel ke ili permesu la individuan konsideron de ĉiu opa kazo, surbaze de la internacia uzo, praktikeco, kaj la deziro de la landanoj mem. Tiel malfermiĝas larĝa ebleco al la individua nomigo de la landoj, sen necesa enkadrigo en fiksaĵajn regulojn.*

Tiu ĉi konkludo al kiu alvenis la kompetenta aŭtoritato, estas la plej pozitiva paŝo ĝis nun farita sur tiu ĉi glitima laborkampo, temo de akraj diskutoj dum jardekoj.

Nun la laboro de la Komisiono eniras duan fazon, tiun de praktika aplikado de tiuj principoj.

Laŭ la fiksa laborplano, la Komisiono nun entreprenas la kreadon de mondmapo, fizika kaj politika, kiujn ni klopodos eldoni.

Samtempe la Komisiono diskutas la preparon de Geografia Terminaro.

Tibor Sekelj

AMBASADOROJ DE LA INTERNACIA LINGVO

En la monda historio estis iam epoko kiam heroaj, sentimaj kavaliroj eniris la malamikan mondon por defendi siajn idealojn, sian reĝon aŭ siajn posedaĵojn.

Pasis tiu epoko, venis pli modernaj metodoj, evoluis la diplomatio, sekvis malpli romantika tempo. Eniris la mondon ne kavaliroj, sed ambasadoroj — oficialaj kaj neoficialaj — por trakti, defendi kaj pledi, por krei bonvolon kaj komprenon.

La historio de la Internacia Lingvo, same, havis sian romantikan epokon. Estis iam tempo, kiam en Universala Kongreso sonis tra la kongresejo la sugestiva alparolo: "Kavaliroj de la Verda Stelo!" Heroaj kavaliroj defendantaj sian idealon atakis la skeptikan mondon per verdaj steloj kaj flamaj vortoj kaj — ni estu sinceraj — ne mankis inter ili Donkiĥotoj.

Pasis, same, tiu romantika tempo. Ŝanĝiĝis la pozicio de la Internacia Lingvo, kiu jam sentiĝis kiel nemalhavebla elemento en la nuna monda situacio kaj ŝanĝiĝis kun ĝi la metodoj por komprenigi ĝiajn gravecon kaj seriozecon al la mondo.

Hodiaŭ, Esperanto jam fariĝis alta kulturtrezoro, ĝuanta respekton kaj bonvolon en plej diversaj rondoj. Hodiaŭ, la movado havas plej eminentajn ambasadorojn inter siaj altaj gvidantoj, vekantajn intereson kaj kreantajn bonvolon en influriĉaj medioj. Sed, krome, hodiaŭ ĉiu *esperantisto* estas kaj devas esti ambasadoro de la Internacia Lingvo. Ĉiu konsciiĝu, pli ol iam, ke en la nuna stadio de la movado li havas altan respondecon, estante portanto de tia kulturtrezoro kia estas Esperanto. Ĉiu konsciiĝu, ke la lingvo jam ne estas nur ludaĵo por vintraj vesperoj, ke ĝi jam ne estas nur rimedo por ferii eksterlande, sed ke ĝi estas evoluinta Internacia Lingvo, uzata sur ĉiuj vivokampoj, ke ĝi estas kultura kaj socia fenomeno, observata kaj prijuĝata de la cetera mondo.

Nobelego devigas. Esti portanto de kulturtrezoro donas — krom la ĝuon de ĝiaj riĉaĵoj — la devon, esti ĝia digna ambasadoro. Ĉar, ne nur la lingvo, sed ankaŭ ĝia uzanto estas observata kaj prijuĝata. Digna ambasadoro oni estas kaj per digna konduto kaj per digna, senriproĉa, flua uzado de la lingvo.

Estas venanta la granda vojaĝsezono. Miloj da esperantistoj tra la mondo pakos la valizojn kaj forvojaĝos por pli aŭ malpli longa tempo al amikoj, korespondantoj, feriaj aŭ kulturaj aranĝoj, al seminarioj, konferencoj kaj kongresoj. La venontaj monatoj estos la tempo de plej intensa buŝa praktikado de la Internacia Lingvo kaj ankaŭ de plej larĝa natura montrado de Esperanto al ne-esperantista publiko. Ĝi estas la tempo en kiu lertaj kaj saĝaj ambasadoroj povas krei netakseblan bonvolon kaj komprenon tra la tuta mondo. Estu grandnombraj tiuj saĝaj ambasadoroj de la Internacia Lingvo!

M. H. V.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio.

Saka ekspozicio en Leipzig 1960.

En la kadro de la XIVa ŝaka olimpiado, okazonta en Leipzig (Germana Demokratia Respubliko) en la tagoj 16.X.—9.XI. 1960, estos organizita la unua internacia ŝaka ekspozicio. La preparkomitato de la ekspozicio celas grupigi ĉion, kio koncernas ŝakludon de malnovaj tempoj ĝis hodiaŭ. Ĝis fino de 1959 promesis sian partoprenon jam pli ol 40 landaj ŝakaj asocioj.

La EŜLI-komitato ricevis inviton partopreni la ekspozicion. Ĝi akceptis tion kun ega ĝojo kaj preparas taŭgan materialon. Por certigi plenan sukceson de nia ekspozicio, EŜLI bezonas malnovajn ŝakajn rubrikojn el diversaj Esp. revuoj, esperantaj rubrikojn el ŝakaj revuoj kaj artikolojn pri ŝakludo, publikigitajn en Esp. revuoj en jaroj antaŭ 1950.

Car nia partopreno estas certe tre grava kaj por nia EŜLI, kaj por propagando de nia lingvo inter tutmonda ŝakistaro (en Leipzig ĉeestos ŝakistoj el 40-45 landoj), ni petas ĉiujn esperantistojn, kiuj posedas iun Esp. ŝakan materialon, ke ili tuj skribu al la sekretario de EŜLI, D-ro V. Faigl (adreson vidu supre!) kaj informu lin, kion ili povus prunti por la ekspozicio. Ĉiu ekzemplero estos redonita.

EŜLI opinias, ke nia partopreno en la ekspozicio helpas ankaŭ al propagando de nia lingvo en la Germana Demokratia Respubliko.

Nia partio : Tal—Smyslov (Bled 1959).

(1. e4, c6, 2. d3) tiun ĉi movon — je la unua fojo en majstra praktiko — uzis Breyer en sia venka partio kontraŭ Bogoljubov, Berlino 1920; la movo estis poste nur tre rare ludita (d5, 3. Ĉd2, e5, 4. Ĉgf3, Ĉd7) kutime oni ludas 4.... Kd6, ekz. en la partio Bogatyrĉuk-Judoviĉ, Moskvo 1931, kiu kontinuas : 5. Ke2, Ĉe7, 6.0-0, 0-0, 7. d4, exd4, 8. Ĉxd4, Ĉg6, 9. Kf3!, Ke5 kaj Nigro venkis en la 62-a movo; la movo en la teksto ne estas bona, (5. d4!) Ŝajna tempoperdo, sed la plua procedo atestas pri bonega observo de Blanko - blankaj figuroj baldaŭ okupos tre aktivan pozicion (dxe4, 6. Ĉxe4, exd4, 7. Dxd4!) Blanko minacas 8. Kf4 kaj 9.0-0-0 (Ĉgf6, 8. Kg5, Ke7) pli bona estis 8....Da5+, 9. Kd2, Dd5! (9. 0-0-0, 0-0, 10. Ĉd6, Da5, 11. Kc4!?) enkonduko al surpriziga kombino (b5?) ludenda estis 11..... Dc5 (12. Kd2) ne Kb3 pro 12....c5 (Da6) konsiderinda estis Db6 (13. Ĉf5!, Kd8) Tal volis ankaŭ post 13....Kc5 daŭrigi 14. Dh4, se 14....bxc4, 15. Kc3, Dxa2, 16. Txd7!, Kxd7, 17. Ĉh6+,Rh8, 18. Dxf6!! kun sekva mato (14. Dh4!!) Vera


Tal!, Korekta, profunde kalkulita figurofero pro atako! (bxc4, 15. Dg5, Ĉh5) aŭ 15.... g6 16. Kc3! Tal post la partio montris, ke je 15.... Ĉe8 li estus ludinta 16. Dxd8, Dxa2, 17. Kc3 kun decidiga atako, ekz. Ĉef6, 18. Txd7, Kxd7, 19. Ĉh6+, Rh8, 20. Dxf6!! kun baldaŭa mato (16. Ĉh6+!, Rh8, 17. Dxxh5, Dxa2) Ĉi tiu movo rapidigas malgajnnon, same kiel gxh6, kontraŭe plej bona defendo estis 17.... Ĉf6 (18. Kc3, Ĉf6, 19. Dxf7!!) decidiga damofero (Dal+) se 19.. Txf7, tiam 20. Txd8+, 21. Ĉxf7+ mato, post la movo en teksto Blanko gajnas kvaliton (20. Rd2, Txf7 21. Ĉxf7+, Rg8, 22. Txa1, Rxf7, 23. Ĉe5+, Re6, 24. Ĉxc6, Ĉxe4+, 25. Re3, Kb6+, 26. Kd4!) pli bona ol 26. Rxe4, K67! kaj Nigro rezignis. — La partio estis honorigita per premio por bela partio.

G. P.

Solvo de problemo Nro 7 : Ĉ x e4. Nur malmultaj solvintoj trovis la ĝustan solvon, plej multajn logis la movo Dxe4, sed ili malatentis la defendon Ĉc4. Ĝustajn solvojn sendis : Viktor Kvist, Danlando, D-ro W. P. Roelofs, Nederlando, Karl Ridder, Germanujo.

Problemo n-ro 9

D. Svozilek, Ĉeĥoslovakio



Mato en 2 movoj.

Kontrolo : Bl. : Rb8, Tb6, Kd7, Ke3, p.:f4,f6 (6) Ni. : Rd5, p. f5 (2)

Solvojn de tiu ĉi facila problemo sendu ĝis fino de la tria monato post apero al la gvidanto de la rubriko.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 30-a de aprilo

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2770	112.15
2.	Belgujo	1985	1966	99.04
3.	Britujo	6565	6188	94.26
4.	Francujo	7111	6407	90.10
5.	Nederlando	5093	4560	89.53
6.	Svedujo	6605	5815	88.04
7.	Finnlando	2515	2185	86.88
8.	Svislando	2075	1730	83.37
9.	Usono	3430	2735	79.74
10.	Hispanujo	2837	2035	71.73
11.	Germanujo	7450	4975	66.78
12.	Norvegujo	2035	1330	65.36
13.	Danlando	2921	1890	64.70

14.	Italujo	4469	2570	57.51
15.	Jugoslavio	7155	3070	42.91
16.	Brazilo	8260	1681	20.35

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Aŭstrujo	1425	1455	102.11
2.	Aŭstralio	1076	1021	94.89
3.	Israelo	250	230	92.00
4.	Kanado	615	550	89.43
5.	Urugvajo	255	215	84.31
6.	Sudafriko	250	210	84.00
7.	Portugalujo	575	470	81.74
8.	Maroko	256	175	68.36
9.	Madagaskaro	250	137	54.80
10.	Novzelando	989	540	54.60
11.	Islando	270	145	53.70
12.	Argentino	815	375	46.01

Por Korekta Esperanto

Verŝajne pro manko de spaco, en la lastjara decembra numero de nia valora revuo ne aperis la kutima averta de la redakcio pri la manuskriptoj, kiuj "devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto". Tamen, en la pufa ovo de mia memfido tuj ekĝermis dolĉa, apenaŭ konfesebla iluzio, kiun devis jam senkompate sufoki la ĉijara januara ekzemplero. La ĝardeno de la (H)esperidinoj estas ĉiam severe gardata kontraŭ senmerita entrudiĝo. Ĉu ni devas definitive forlasi ĉiun esperon pri l'empaŝo?

Postuli korektan lingvouzon de eventualaj kontribuantoj estas saĝa zorgo de la redaktoro, komprenebla devo al la legantoj kaj grava servo al nia movado. Sed kiel la izolita, progresema samideano povos akiri tiun nepre necesan korektecon en la lingvouzo? Ĉu la movado provizas facilajn kaj oportunajn rimedojn por tio? Mi sincere dubas.

Ja ekzistas abunde bonegaj libroj, abonindaj gazetoj, instruaj artikoloj, sonoraj prelegoj, diskoj, sonbendoj, ktp. Tamen, se izolita, jam progresinta lernanto deziras sin prepari por supera ekzameno,

tiuj rimedoj ne sufiĉas. Necesas kompetenta persono, kiu korektus liajn skribajn taskojn, tradukprovojn, lin konsilus kaj helpus. Ekzerco bone korektita de kapabla persono estas senkompare pli instrua kaj fruktodona por la studanto, ol longa traŝvitado super la "Plena Gramatiko" aŭ jar-kolekto de la revuo "Esperanto".


Ne mankas en niaj vicoj kompetentuloj, kiuj povus surprizi tian taskon, ege necesan kaj gravan, en la formo de *perkoresponda korekto-servo*, kaj kontraŭ honorario kompreneble. Oni bezonus nur tralabori la ideon kaj organizi ties efektiviĝon. Al la efiko de la ekstera propagando devas respondi la rezulto de interna propagando. Venis la momento fervore kuraĝigi la ellernadon de nia lingvo per ĉiuj rimedoj. Espereble mi ne vane levis tiun ĉi demandon.

Naiva, utopia ŝajnos eble la sugesto, sed ne pli ol la postulo pri la perfekta Esperanto. Kiu deziras la celon, deziras ankaŭ la rimedojn.

Henri Vatré

KRUCVORTENIGMO

HORIZONTALE : 1. Sankta libro de Mahometanoj — 7. Herba veg. el kies fibroj oni faras plej bonan tolon, pli ŝatatan ol la kotona — 9. Nedifina adjektivo, signifanta : de ne preciza definitiva speco. 11. Entranĉi aŭ ŝiri per



dentoj — 13. Vergeto kun ĉevalharoj por ludi sur kordaj muzikiloj — 15. Dekfoje cent — 16. Poseda adj. aŭ pron. signifanta : posedata de ni — 17. Fari tratuon per pinta ilo — 18. Malnova kruda lumigilo konsistanta el tordita ŝnuro aŭ ligna bastono ŝmirita per rezino, vakso aŭ peĉo — 20. Duoble kvar — 21. Adverbo derivita el "mano" — 23. Tuto de la reguloj montrantaj al la homo liajn devojn en socia aŭ privata konduto.

VERTIKALE : 2. Konjunkcio uzata post supereca aŭ malsupereca komparativo por kunligi du samnaturajn kunkomparitaĵojn — 3. Samsoneco de la finaj silaboj en du aŭ pluraj versoj — 4. Membro de grupo — 5. Ordinara laŭregula stato — 6. Veg. el fam. de kariofilacoj, kies pluraj kulturataj specoj havas belajn florojn kaj fortan iom pipran bonodoron — 8. Ŝtoneto — 10. Muzika ritma melodio — 12. Tio, kion oni diras — 14. Logo de tio, kio estas ĉarma — 17. Taŭga — 19. Konjunkcio montranta, ke la propozicio, kiu sekvas ĝin, estas la motivigo aŭ klarigo de la antaŭiranta aŭ postiranta propozicio — 22. Prepozicio montranta la materialon, kiu konsistigis ion.

(Waldson Pinheiro)

SOLVOJ

(de la antaŭa enigmo)

HORIZONTALE : 1. Korano — 7. Lino — 9. Ia — 11. Mordi — 13. Arĉo — 15. Mil — 16. Nia — 17. Bori — 18. Torĉo — 20. Ok — 21. Mane — 23. Moralo.

VERTIKALE : 2. Ol — 3. Rimo — 4. Ano — 5. Normo — 6. Dianto — 8. Siliko — 10. Ario — 12. Diro — 14. Ĉarma — 17. Bona — 19. Ĉar — 22. El.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

RIMEDO KAJ ENHAVO

La reeĥo de mia cirkulera invito al pli regula kunlaborado en nia komuna organo "La Juna Vivo" estas eĉ nun, post ses monatoj preskaŭ nenia. Inter la malmultaj respondoj (el Britujo, Bulgarujo, Hispanujo, Hungarujo, Svedujo kaj la Skolta Esperantista Ligo) mi trovis interesan leteron de la juna esperantisto Roger Imbert el Parizo. Parton de la letero mi volas ĉi tie prezenti al la legantoj :

"...Volonte mi aktive kunlaboros laŭ miaj ebloj en via kroniko. Fakte mi jam venas kun unua sugesto : Ĉu ne estus interese, ke TEJO organizu ĉu enketojn, ĉu debatojn pri la plej diversaj junularaj problemoj ? Tiu formo de artikoloj tirus, laŭ mi, pli aktivan partoprenon de la membraro en la asocia teamo. Kiajn temojn mi sugestus ? Ho, mi havas multajn ideojn : por aŭ kontraŭ ĵaz-muziko ; ĉu laŭ vi povas ekzisti profunda amikeco inter junulo kaj junulino ; rilatoj inter la juna kaj la antaŭa generacioj ; ktp, ktp. Do, fakte mi imagas la aferon tiel : Unu junulo verkas disertacieton pri la koncerna temo, kaj aliaj devas kritiki aŭ alporti novajn ideojn. Sed certe por tio la aktuala spaco en la revuo estas tro limigita.... Mi proponas la nomon "Junulara enketo" por ĝi".

Traleĝinte la leteron mi enpensigis. Post la naŭmonata redaktado mi konstatis, ke la tuta spaco de "La Juna Vivo" estas plenigita per la ekskluzive organizaj informoj kaj artikoloj. Eĉ la unuaj treege superas la duajn, registrante pli aŭ malpli gravajn okazintaĵojn en la junulara movado ĉu landa, ĉu internacia. Certe ankaŭ tiaj kontibuaĵoj estas necesaj kaj tre utilaj, precipe se ili larĝe traktas ĝeneralajn kaj fundamentajn problemojn. Sed ŝajne ni forgesas kial ni havas organizon. Ĝi estas nur rimedo — ĉiuokaze atentinda — sed ne la ĉefa, ne la celo. Kvazaŭ ni forgesus ofte ke Esperanto havas ne nur estontecon, sed ankaŭ estantecon. Kvazaŭ ni ne konscius, ke ni havas en la manoj (aŭ en la buŝoj) rimedon, kiun la cetera junularo en la mondo ne havas. Ni ofte forgesas ĝin. Nia celo estas detruo la plej diversajn barojn kiuj staras inter la diverslandaj gejunuloj, alproksimigi ilin, akceli ilian interkompreniĝon. Ĉu ne plej efike ni tion plenumos se ni konatiĝos kun la agado, vivo, konduto kaj pensado de la junaj homoj en tre diversaj landoj. Kaj tiel senpere, tiel

de proksime tion fari povas certe neniu krom ni esperantistoj. La organizo helpas al ni altiri ankoraŭ novajn kaj novajn gejunulojn kaj konvinki ilin ke ili vane ne perdis la tempon por ekposedi nian rimedon. Cetere ju pli da uzantoj des pli utila estos la rimedo ankaŭ por ni !

La letero de Roger estu la instigo por pripensi kiel forigi unuflankecon kaj monotonecon el niaj gazetoj kaj renkontiĝoj.

Ivo Osibov




LA 16-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO MARSAS RENKONTE AL PLENA SUKCESO

Pro la daŭre alvenantaj aliĝoj, 85% el la disponeblaj lokoj en la belega kongresejo "De Tempel" estas rezervitaj.

Baldaŭ — TRE BALDAŬ — la Loka Kongresa Komitato estos devigata rifuzi pliajn aliĝojn.

Pro tio, kiu intencas partopreni la 16-an I.J.K., kaj ankoraŭ ne sin anoncis, estas varme konsilata sendi senprokraste la aliĝilon kaj la pagon (ĝi estu minimume la duono de la kotizo).

Ĉiuj aliĝintoj jam ricevis la Duan Oficialan Informilon. En ĝi troviĝas ĉiuj necesaj informoj kaj ankaŭ la definitiva programo, kiu enhavas i.a. prelegojn de Prof. Ivo Lapenna (Rolo de la Junularo en la Nuntempa Esperanto-Movado) kaj de D-ro Paul Neergaard (Lukto kontraŭ la Malsato).



Angulo en "De Tempel", la kongresejo de la 16-a I.J.K.

Al la programo estas ankoraŭ aldona oficiala akcepto en la unika Rotterdam-a "Konstrucentro" kaj vizitado tie de la aktuala ekspozicio "Junularo kaj Spaco" kun esperantlingvaj klarigoj.

La lastan kongresan tagon bela ŝipo veturigos nin al la hidraŭlikaj laboroj de la "Delta-Plano". Ni vidos surloke la ekkonstruon de grandaj digoĵoj kiuj en proksima estonteco fermos ĉiujn danĝerajn enirlokojn de la maro en la sudokcidenta parto de Nederlando.

Ne atendu ĝis morgaŭ por sendi vian aliĝon ! Morgaŭ eble estos tro malfrue !

Ĉiujn informojn petu al : 16-a I.J.K., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

JUNULARO EN LENINGRAD

La rondeto, kiun gvidas studento Stanislav Kotljarov ĉe la Pedagogia Instituto en Leningrad, Sovetunio, preparis fine de la pasinta jaro la unuan numeron de la murgazeto "Velo". En ĝi estas ĉi tiuj artikoloj : "For la lingvaj baroj" (pri Zamenhof), "La Jubilea" (pri la Universala Kongreso en Varsovio), "Ĉu necesas la Internacia Lingvo", "Esperanto en mia vivo" (de bulgara docento) kaj "Per biciklo tra Eŭropo" (de finna amiko); nur la lasta estas en Esperanto, la aliaj estas en la rusa lingvo, ĉar la celo de la murgazeto estas propagandi Esperanton en la Instituto. Estas ankaŭ aliaj artikoloj, humoro kaj satiro. Tiu murgazeto estas montrita dum la kunsidoj dediĉitaj al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof en la Domo de la Sciencistoj, kaj nun ĝi migras en la Instituto restante po kelka tempo en la diversaj fakultatoj (ili estas dek en la Instituto). Ĝi interresigas la gestudentojn pri Esperanto.

PARTOPRENU LA ORATORAN KONKURSON EN BRUSELO !
GAJNU LA POKALON-LAPENNA !

Tra la Mondo

Danlando

Per decido de la 5-a de majo 1960 Lerneja Direkcio de Kopenhago aprobis novan dujaran oficialan eksperimenton pri Esperanto kiel deviga fako: 2 lecionojn semajne en 3-a mezlerneja klaso de S-ro Poul Thorsen, Randersgades Skole, Kopenhago Ø. (geknaboj 14-jaraj). La instruado komenciĝos 1-9-60 kaj estos principe utiligata en la geografia instruado. S-ro Thorsen tial petas al ekster-eŭropaj kolegoj kontakti lin rilate interŝanĝon de geografiaj materialoj.

★

La broŝuro "Kie abundo estas malofta kaj manko pli malofta — Danio" jam preskaŭ elĉerpiĝis de la ambasadorejoj (ĝi aperis en la fino de marto), kaj tial la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, Danlando, decidis jam eldoni novajn 5000 ekz. Tial se vi deziras havi la bele ilustritan broŝuron tuj vin turnu al la plej proksima Dana Ambasadorejo, kie ĝi estas havebla tute senpaga.

★

En marta numero de "Dansk Esperanto-Blad" aperis provizora raporto de S-ino Roma Thorsen pri ŝia 2-jara eksperimenta Esperanto-instruado en la lernejo "Vibenshus", Strandboulevarden, Kopenhago. Ĝi estas skribita okaze de la "Lerneja kampanjo" en Danlando kaj sendita al ĉiuj kopenhagaj lernejestroj kaj multaj danaj gazetoj, kiuj lastaj tre favore akceptis ĝin.

La Lerneja Direkcio de Kopenhago aprobis daŭrigon de la eksperimento por ankoraŭ unu jaro laŭ deziro de la gepatroj.

Laŭ iniciato de la instruistino la eksperimento estas filmita. La filmo "Saluton", 10-minuta kaj silenta kun Esperanto-tekstoj, montras la instrumentodon kaj la praktikan uzadon de la lingvo en la geografiaj lecionoj per la internacia lerneja gazeto "Grajnoj en Vento", interŝanĝo de geografiaj dokumentoj, korespondado, ktp.

La unua prezentado en eksterlando okazis dum la pasko en Budapeŝto, kie S-ino Roma Thorsen i.a. prelegis pri sia lerneja laboro laŭ invito de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro.

Finnlando



Tridekunu gelnantoj en finna elementa lernejo (5-a klaso) studas Esperanton laŭ oficiale aprobita studplano. S-ro Jorma Ahomaki instruas.

En Helsinko, Finnlando, okazos la 12-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en la tempo de la 11-a ĝis la 16-a de junio 1960. Adreso: Helsinginkatu 6 B, 50 Helsinko, Finnlando.

Francujo

Sub la aŭspicioj de U.E.F. kaj kun helpo de S-ino FAYOT, S-roj RIBOT kaj ROSSEAU estis aranĝita dum majo 1960 ekspozicio pri "Esperanto kaj Poŝto". Tiu ekspozicio okazis en la enirvestiblo de "La Monde Philatéliste", 14, rue du Helder, Paris.

Germanujo

Ek de marto 1960 en Oldenburg, Germanujo, ekzistas "Laborkomitato por Eŭropaj Ekonomiaj Problemoj". Tiu rondo pritraktas aktualajn problemojn de la eŭropa ekonomia kunlaborado. Per la analizo de la ekonomiaj aferoj de la diversaj eŭropaj ŝtatoj tiu laborkomitato volas prosperigi la klopodojn por unuiĝinta Eŭropo.

Grava estas por la Esperanto-movado ke la LEEP uzas Esperanton por siaj eksterlandaj rilatoj kaj ankaŭ povas registri sukcesojn per tio. Personoj, kiuj parolas Esperanton kaj sin interesas pri tia laboro povas skribi al: "Laborkomitato por Eŭropaj Ekonomiaj Problemoj", p.a. Georg Müller, Oldenburg i.O. (23), Stettiner Str. 26, Germanujo.

Hindujo

La 8-an de marto 1960 estis fondita la Esperanto-Societo de Kalkata post mallonga sed intensa kurso gvidata de S-ro Tibor Sekelj. La societo kunvenadas unufoje semajne por daŭrigi la studadon de la Internacia Lingvo. Prof. Somnath Maitra estas prezidanto de la grupo, kiu forte deziras kontakti aliajn societojn en Hindujo por preparo de la fondo de "Esperanto-Asocio de Hindujo".

Hispanujo

Madrida Esperanto-Klubo aranĝis la 11-an de aprilo violonkoncerton kun la koncertistino Ilona Regeczy, kiu estas esperantistino. La altkvalitan aranĝon ĉeestis inter aliaj eminentuloj Marquizo de Lozoya, eksĝenerala direktoro de Klubo por Belaj Artoj, kiu varme gratulis la koncertistinon pro la bonega muzikludo. La Markizo tre interesiĝis pri Esperanto kaj tiurilate li faris multajn demandojn por informiĝi pri la Esperanto-movado en Hispanujo kaj ĝenerale tra la tuta mondo.

Hungarujo

En la unua distrikto de la industria urbo Miskolc, Diosgyor, funkcias la Centra Metalurgia Muzeo de Hungarujo sub patronado de la fabriko "Lenin Metalurgia Kombinato". La muzeo eldonis 8-paĝan ilustritan broŝuron kiel gvidilon tra la muzeo. La hungarlingvan artikolon sekvas resumo en Esperanto. La adreso: Centra Metal-



La foto montras la prezidantan tablon de la grandioza Zamenhof-festo en Hungarujo. Ni vidas: S-rojn Harmati Sandor, D-ro Nezval Ferenc, Ministro de Justico, Moszczenski Jan, Kultura Ataŝeo de Hungarlanda Ambasadoro de Pola Popola Respubliko, Ges-rojn Gulyas Istvan, Domokos

Lajos, Julio Baghy, Sulyan Gyorgy, D-ro Kalocsay Kalman, Kenesei Maria, Marton Lajos, — D-ro Ferenczy Imre kaj D-ro Mateffy Jozsef, membroj de Prezidentaro de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro. La feston ĉeestis iom pli ol 400 personoj.

urgia Muzeo, Miskolc-Diosgyor, Hungarujo.

Italujo

La dua eldono de la 32-paĝa ilustrita gvidlibro de la antikva urbo Ravenna estas eldonita. Oni povas senpage ricevi specimenon mendante ĝin per poŝtkarto al "Esperanto-Grupo", Piazza Anita, N. i. Ravenna, Italujo.

Japanujo

En "Mia Sekreto", la plej multe vidata programero de N.H.K.-Televido en Japanujo la 28-an de marto ĉijare sukcese prezentiĝis Esperanto-inter-



parolo. La bildo montras de maldekstre: la interpretanton S-ron Suzuki Kijoŝi, U.E.A.-fakdelegito de Tokio, S-ron Tibor Sekelj kaj S-ron Tukahaŝi K., la anonciston.

Jugoslavio

En la urbo Dubrovnik komenciĝis kurso por komencantoj en Esperanto. La kurson gvidas Prof. Matković, kiu jam dum 4 jaroj kun sukceso instruas Esperanton en mezlernejo por glernantoj.

★

La eminenta itala kaj esperanta verkistino S-ino Clelia Conterno Guglielminetti el Torino vizitis komence de aprilo Jugoslavion laŭ invito de la Esperanto-Klubo en Ljubljana kaj prelegis tre interese pri pluraj temoj en 7 urboj. Pluraj gazetoj kaj la radio informis pri ŝia estado en Jugoslavio.

Pollando

La 2-an de aprilo 1960 fondiĝis kiel la unua en Pollando kaj en la tuta mondo Pola-Esperanta Geologo-Klubo. La klubo interesiĝas pri diversaj problemoj de geologio, ekz.: inĝeniera geologio, hidrogeologio, krudaja geologio, ktp. — ankaŭ pri problemoj de geologiaj terboradoj kaj pri vivo de geologoj kaj terboristoj en la tuta mondo. La adreso estas: Pola-Esperanta Geologo-Klubo, Varsovio 10, str. Jasna 6, Pollando.

Svedujo

En Stokholmo la sveda sekcio de "Kristana Esperantista Ligo Internacia" en la paskaj tagoj festis sian

25-jaran jubileon dum sia jarkonferenco. Oni reelektis la estraron. Ĉe Esperanta diservo predikis E. Carlén.

★

K.E.L.I. aranĝos kurson en Esløv de la 16-a ĝis la 22-a de julio, kaj ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe: sekr. K. O. Sandgren, Box 87, Østansjø, Svedujo.

Svislando

La Feriaj Kultur-Semajnoj "Esperanto kaj Geonismo" okazos en Kastelo Münchenwiller apud Murten-Morat, Svislando, en la tempo: 7-21-a de aŭgusto 1960.

Usono

La plej nova libro de la fama lingvisto ĉe la "Columbia Universitato", New York, Prof. Mario Pei, havas la titolon: "Unu Lingvo por la Mondo — Kaj kiel atingi ĝin". Kvankam Prof. Pei ne estas esperantisto, li estas sincera kunbatalando por mondlingvo. La libro estas tre leginda kaj por esperantistoj kaj por ne-esperantistoj. Ĝi estas verkita por interesigi homojn pri internacia lingvo kaj tiel multe povas helpi al progreso de Esperanto.

ISLAMA LIGO

Dum la 44-a U.K. de Esperanto en Varsovio fondiĝis la Tutmonda Islama Esperanto-Asocio. La asociaj planoj estas multflankaj, i.a. tradukado en Esperanton de La Korano, disvastigado de la Islama Religio (kiu ampleksas pli ol 330 milionojn da personoj), k.t.p. La islamanoj deziras sin organizi en la Esperanto-kampo, diras **Tutmonda Islama Esperanto-Asocio, Djakarta, Indonezio.**

ESPERANTISTA VIVO

NASKIĜO

Ges-roj Kenneth kaj Sybil Sly, Anglujo, plezure anoncas la alvenon de filo Arturo Ludoviko la 11-an de aprilo 1960.

★

La del. de UEA en Zwijndrecht, Nederlando, S-ro J. Melger kaj edzino S-ino J. A. Melger—Eijsberg, informas kun granda plezuro pri la naskiĝo de filo Arjan Hans.

★

Ges-roj Elisabeth kaj Leif Heilberg, New York, sciigas pri la naskiĝo de sia filo Aleksander la 6-an de aprilo 1960.

FIANĈIĜO

Jacques Tuinder kaj Dievera Dekker anoncas sian gefianĉigon, kiu okazis la 17-an de aprilo ĉijare.

JUBILEOJ

Ekscelenco D-ro Antonio Eltschkner, titola episkopo de Zefirio kaj helpepiskopo de Praha, eksprezidanto de la Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo festos la 80-an datrevenon de sia naskiĝtago la 4-an de junio 1960. Lian daŭran sindonon al Esperanto pruvas esperantlingva radio-parolado okaze de IKUE-kongreso en Vieno 1958, kaj salutletero okaze de la Esperanto-kongreso en Italujo kaj alia vigla korespondado.

★

La 13-an de majo festis la pola esperantisto **Mag. fil. M. Zgorzewski** la 60-jaran datrevenon de sia naskiĝtago. Li estas unu el la plej aktivaj esperantistoj de 1917, kiam li esperantiĝis nur 17-jara junulo. Li eldonis multajn kantetojn kun Esperanto-teksto kaj verkis artikolojn nacilingvaj pri D-ro L. L. Zamenhof, Esperanto kaj pri UEA por polaj gazetoj. Krome li estas kunlaboranto de la UEA-Gazetaro Servo.

Nekrologo

En sia 85-a jaro kaj post longa malsano, ĵus forpasis malnova skota pioniro, **Fraŭlino Jane Baird, Edinburgo.** Jane Baird estis iam ano de la Lingva Komitato, ano de la L.K.K. por la U.K. en Edinburgo en 1926, kaj unu el la tri kompilantoj de la "Edinburgh Esperanto Dictionary", de kiu ĝis nun pli ol cent mil ekzempleroj disvendiĝis en angla-parolantaj landoj. Ŝi estis unu el la britaj reprezentantoj ĉe la Edukada Kongreso sub aŭspicio de la Ligo de Nacioj, ĉe la Mondkonferenco de Edukado en Genevo en 1929, kaj reprezentis la Edukadan Instituton de Skotlando ĉe la U.K. en Budapeŝto. Ŝia forpaso estas granda perdo por la movado en Skotlando, sed ŝia memoro estos daŭra instigo al fidela laboro por Esperanto.

D. Kennedy

★

D-ro Augustin Pitlik, Prago, mortis en la aĝo de 77 jaroj. D-ro A. P. esperantiĝis jam en 1902, estis lektoro de Esperanto ĉe la teknika altlernejo en Prago, fondis la Ĉeĥan Esperanto-Instituton, kies prez. li estis. D-ro Augustin Pitlik estis Honora Membro de UEA.

★

La 13-an de februaro 1960 mortis en la aĝo de 81 jaroj **S-ro Henriko Fischer** en La Tour de Peilz, ĉe Lago Lemana (Genevo), Svislando, la lasta el la rumanaj pioniroj de la unua generacio. Henriko Fischer esperantiĝis en 1902, fondis Rumana Esperantista Societon, kies prez. li estis ĝis sia ekziliĝo en 1941.

daŭriĝo p. 118

Belartaj Konkursoj 1959

B r a n ĉ o : Originala Drameto

Dua Premio

RAPSODIO EN VERDA

(La prezidantino sidas sola ĉetable ĝis la kvin grandnaciaj delegitoj envenas)

Prez. : Nu, Sinjoroj, mi vidas, ke ni ĉiuj ĉeestas. Mi apenaŭ bezonas akcenti la egan gravecon de ĉi tiu kunveno por la estonteco de la homaro. Por la unua fojo en nia historio malfermiĝis kvazaŭ pordo en la nigra muro de la spaco ĉirkaŭ nia sunsistemo, por tralasi al ni intelligentan estulon el alia mondo. La astro Vego evidentiĝas kiel la varmiganto de loĝata planedo, kies anoj posedas civilizacion, kiu tiom superas nian, kiom nia estas pli evoluinta ol la paleolitika kulturo. Hodiaŭ ni intertraktos kun la Vega ambasadoro pri precipe komerco, kiu ŝajne estas la ĉefa motivo por lia vizito al nia tero. Mi tamen ne devas diri, ke ia ajn traktato kun la Veganoj ankaŭ neimageble antaŭenigus niajn sciencan, teknologian kaj ĝeneralan kulturan vivaspektojn, por ne menci la plibonigon de materiaj kondiĉoj. Tio do estos nia tasko, aŭ eble mi devus diri *via* tasko, ĉar mi ja nur estas via senpartia elektita prezidantino kaj vi la ĉefaj registoj de la plej potencaj landoj en la mondo.

A : Estas por ni tre bonŝanca afero, ke tiuj eksterteranoj ne estas konkeremaj, ĉar evidente niaj rakedoj kompariĝas kun iliaj spaciloj kiel... nu, infanaj ludiloj kun io tute fantazia.

B : Je-es, kontraŭvole mi tion konsentas, kvankam ja la lunprojektiloj de mia nacio...

C : (malice)ne povas esti menciataj samspire kun iliaj spacgloboj aŭ eĉ telerŝipoj !

B : (leviĝante, al la prezidantino) Sinjorino, mi ne lacigis min veturante ĉi tien por gluti insultojn kontraŭ mia lando !

D : La simplan veron.

E : Ĉit, vi eta dogido !

Prez. : Sinjoroj, Sinjoroj ! Bonvolu bridu vin. Estas ja konate, ke vi ĝuas tranĉi unuj la aliajn per akraj vortoj, sed ne estas la okazo nun por tradicio. Ĉi tio ne estas packonferenco, ĉe kiu vi alcelas nur proprajn avantaĝojn. Temas nun pri afero, kiu tuŝas la tutan homaron. Ni jam blufis la Veganon pri niaj pacamo kaj esenca unueco tutmonda. Parte li tamen ankoraŭ opinias nin barbaroj, kaj se vi montrus malkonkordon kiam li

envenos, li tuj forirus. Lia raso malamas kverelojn kaj militojn. Li jam multfoje asertis tion.

C : (A1 B) Nu, mi petus vian pardonon, se vi farus same.

B : Diable, kial ? ! Eble, tamen, jes — al la Vegano — pro via ĉeesto kiel misrepresentanto de la homo !

(Tumulto. Seĝoj skrapas la plankon pro iuj leviĝantaj)

Prez. : Ordo ! Ordo !

(Oni fine kvietiĝas. Paŝoj eksonas ekstere)

A : Ŝŝt ! Iu venas. (Urĝe). Sinjoroj, estus pli bone por ni friponi kune, ne dise. Alie ni malsukcesos aranĝi tiun traktaton, kiun ni ĉiuj tiom deziregas. Ni pensu per la cerbo, ne per la glandoj !

La V : Bonan tagon. (Al la Prez.) Tio estas la ĝusta salutesprimo, ĉu ne ?

(Ŝi kapjesas — samtempa murmuro de aprobo fare de ĉiuj)

D : Vi parolas mian lingvon bone.

C : Ĝi ne estas nur via lingvo !

E kaj B : (Samtempe) Ŝŝ ! (Embarasiĝas pro la demanda esprimo sur la vizaĝo de la Vegano).

A : (Rapide). Ne daŭros longe antaŭ ol via ekscelenco scipovos ĉiujn kvar niajn lingvojn. Via mirinda ellerno de tiu de niaj du kolegoj pruvastion. La Veganoj devus esti tre lertaj je la lingvo !

La V : Efektive jes, sed precize tial ni ne intencas akiri pli ol po unu parolmaniero por ĉiu planedo. Pardonu al mi la diron, sed estas pura sensencaĵo por civilizita komunumo uzi pli ol unu interlingvon.

Prez. : Ni ne komprenas.

La V : (Ŝin rigardante kvazaŭ tondro estus frapinta lin). Ĉu eblas, ke niaj telerŝipaj esploristoj eraris pri la nivelo de la evoluo en ĉi tiu mondo ? Eble ni devus atendi alian jarcenton antaŭ ol aranĝi la traktaton. Jes, sendube....

A : Ne, ne ! Ni konsentas kun vi. Via moŝto nur malkomprenis ŝian intencon. Finfine oni ne povas racie atendi, ke vi jam ellernis teran lingvon dum du semajnoj. Ankaŭ emocie ni estas stranga raso, kvankam logike ne sen senco. Sed ĉu via moŝto ne deziras sidi ?

La V : Ne dankon, mi ne povas laciĝi.

D : Nu, mi ĉiukaze ne divenas ajnan kaŭzon por argumento. Vi jam konas la interlingvon de nia mondo.

A, B, E : (Kune) Vi eraras !

C : Li *ne* eraras. Nia lingvo estas parolata de la plej granda nombro de homoj.

E : Pardonu, ke mi konfuziĝas, sed ĉu vi parolas pri via lingvo aŭ pri mia ? Ĉar efektive dufoje tiom da personoj uzas mian ol vian.

(C kaj D rigardas lin kolere)

D : Ni parolas pri civilizitaj homoj, ne pri brunuloj !

E : Vi volas diri blankajn barbarojn ! Mia lando estis jam nesto de la civilizo kiam viaj prapatroj

ankoraŭ ŝmiris sin bluaj kaj sin vestis per kokstukoj anstataŭ vestoj.

B: (Al C kaj D) Via lingvo ne plaĉas al mi. Mi vetoas ĝin. Prefere ni uzu mian. Multaj ĝin lernas nuntempe, ĝi estas la plej grava surtere.

A: Sed ĝi estas multe tro malfacila. Kompare al ĝi la latina estis ludaĵo. Mia lingvo, tamen, estas sendube la plej bela kaj glora en la mondo. Ĝi estas la lingvo de la civilizacio.

E: Strangan iluzion vi havas, ke la civilizacio estas inventaĵo de via parvenua popolo!

Prez.: Sinjoroj, pardonu la interrompon, sed lia ambasadora moŝto ŝajne tediĝas.

La V: Jes, kaj koleriĝas. Vi provis trompi min pri iuj detaletoj pri via kulturenivelo. Sed eble mi indulgu vin. Vi ja estas stranga specio, plena de kontraŭaĵoj. Tamen mi vere ne disponas la paciencon longe argumentadi kun vi pri ĉi tiu temo. (Mediteme) Jam sur tiom da planedoj oni elbuŝigis al ni tiajn infanecajn rezonaĵojn. Vi asertis, ke tiuj sinjoroj eraris, pretendante la superecon de ilia lingvo. Tio estas tute prava. (Ĉiuj delegitoj, krom C kaj D ŝajnas feliĉaj pro tiuj ĉi vortoj). Sed vi ĉiuj eraras! Neniu el viaj lingvoj estas akceptinda al la Veganaj. Oni simple rifuzos lerni iun ajn.

(Konsternita silento)

Prez.: Ni petas vian indulgon, sed bonvolu klarigi al ni kial ne.

La V: Certe, sed nur mallonge. Iuj el vi fanfaronas pri la granda nombro da homoj parolantaj siajn du lingvojn, kvazaŭ tio estus decida argumento. Sur mia planedo tiu senracia, obseda kredo je nombroj nur tial ke ili estas grandaj apartenas al la prakrepuska tempo de magio kaj superstiĉoj. Tiu rezonaĵo do neniel interesas min, sed ĉiukaze ĝi estas duoble falsa, ĉar ĝi eĉ ne posedas la postulitan nombran bazon. (al D) Ekzemple nur ĉirkaŭ dek procentoj de la homaro iel ajn konas vian lingvon. Jes, mi anticipe studis tiajn statistikojn! Sed, kiel mi diris, la demando pri nura nombro ne koncernas nin Veganajn, ĉar tute aliaj konsideroj regas ĉi tiun aferon. Viaj lingvoj ne estas akceptindaj tial ke ili estas tro malfacilaj kaj ankaŭ pro tio, ke praktike kaj emocie ili reprezentas iujn sekciojn de la homaro malavantaĝe al la aliaj. Tio validas por ĉiuj lingvoj jam aluditaj ĉi tie. (Al B) Vi, sinjoro, parolas pri lingvo de scienco. Kion la homoj finfine scias pri la scienco? Ni Veganaj ne postulas, ke vi lernu nian lingvon pro nia ega scienca supereco, kaj certe ni ne pene studos vian pro via evidenta malsupereco tiurilate. (Al A) Kaj vi amuzas min. Ni Veganaj ne estas sen aprezo por la belo, sed tio ne stultigas nin tiel ke ni lernus malfacilan lingvon por praktikaj celoj prefere ol pli facilan nur pro ĝia cetere priargumentinda pli granda beleco. Ni lasos vian lingvon kun la aliaj tri al la arkeologoj de mia mondo. Ili tre interesiĝos pri ili. Sed ni nun kon-

cernu nin pri la kerna punkto: por traktato kun la Veganaj vi devos lerni unu lingvon akceptindan al ni!

C: Kiun lingvon vi celas? Ekzistas 3,000 lingvoj kaj dialektoj sur la tero.

La V: Mi ekzamenis ilin el struktura vidpunkto per la elektronaj analiziloj en mia spaglobo. La rezulto de tio kaj de aliaj principoj tuŝantaj la problemon, precipe rilate la neŭtralecon, kiu tre gravas por via emociema planedo, montras la fingron de certeco al nur unu eblaĵo, nome al la 3,001-a lingvo, de vi ĉiuj neglektita.

E: Kaj tio estas....?

La V: Esperanto.

D: Ne!

E: Nun mi scias, ke ĉi tio estas nura sonĝo. Estulo de alia sunsistemo! Esperanto!

B: Strange, ke min obsedas la sama sonĝo.

A: Pinĉu vin. Oni diras, ke tio ofte akcelas la vekigon.

B: Nu, bone, faru tion mem. Vi donas tielajn saĝajn konsilojn!

C: Mi tamen ankoraŭ ne povas ne opinii, ke mi sonĝas.

La V: Via opinio estas prava, sed en alia senco ol vi supozas. Vi ĉiuj sonĝas, ĉar vi jam de longe vegetas en profundega dormo — la dormo de la raciaj funkcioj de la menso. Via ĝisnuna sonĝo temis preskaŭ ekskluzive pri la stultaĵoj de tradicio kaj mallarĝaj aspiroj naciaj kaj egoismaj. Sed via sonĝo ne rakontis al vi, ke ekzistas homara kaj homeca realo. Jes, vi sonĝas, sed mi diru al vi nun, ke vi ekvekiĝu. La estintaĵoj tiom katenas viajn imagojn, ke la eblo de libera, feliĉa futuro ŝajnas al vi fantazia. Esperanto estas unu el la malmultaj pruvoj pri realismo kiujn mi trovis en viaj torditaj socioj, sed kia ironia inversaĵo de la vero, ke vi konsideras kiel iluzion revon ĝin anstataŭ la emociajn sensencaĵojn kiuj tiomgrade sklavigas viajn vivojn! Mi malkaŝu al vi sekreton. Kiam mi venis ĉi tien mia registaro ankoraŭ ne decidis absolute, ĉu aŭ ne traktato kun vi valorus la penon. La esenca parto de mia komisiono konsistis en plua, ĝisfunda esplorado pri vi, kian oni ne povis plenumi per aparatoj ekster aŭ eĉ interne de via atmosfero. Oni lasis al mi la taskon decidi fine. Nu, Esperanto estis la decidiga faktoro. La traktato estos aranĝita, sed nur kondiĉe, ke vi enkonduku tiun lingvon en ĉiujn lernejojn en viaj respektivaj landoj kaj ke vi mem lernu ĝin. La aliaj nacioj baldaŭ sekvus vian ekzemplon. Kaj interalie bonvolu noti, ke mi — kiel la ceteraj Veganaj — tute ne estas blufeblo, kiel vi misopinias. Ĝis nun mi ne ĝuste scias, ĉu mi devus kompati vin aŭ perdi la paciencon aŭ eĉ ridi pri viaj infanaj provoj trompi min. Certe ne taŭgus por vi friponi kune, kiel tiu sinjoro konsilis antaŭ ol mi entretis ĉi tiun ĉambron.

(Konsterniĝo kovras la vizaĝojn)

Jes, mi estas telepatia kaj povas facile kaj laŭdezire ekkoni viajn plej sekretajn pensojn. Ankaŭ por akriigi mian komprenemon mi havas malantaŭ mi la sperton de vivo ampleksinta ĝis nun pli ol sep mil de viaj jaroj.

E: (Duonflustre) De antaŭ la fondiĝo de la ĉiela regno de mia antikva lando.

A: Antaŭ ol la plej antikvaj piramidoj estis konstruitaj!

La V: Jes. Efektive mi rigardadis parton el tiu laste menciita entrepreno dum frua esplorvizito ĉi tien. Jam longe mi studis vian specion.

C: Ĉi tio nepre devas esti sonĝo!

D: Kiu vi estas? Kiu vi vere estas?

La V: Nur ambasadoro-komercisto de Vega planedo, aŭ — se vi preferus tion — ankaŭ la voĉo de via homara konscienco apelacianta al vi, la potenculoj de la mondo. Se vi deziras kunvivi sekure kaj feliĉe sur malstreĉiĝanta kaj ĉiam pli eta terglobo, vi devos lerni interkonsenton, kaj la leciono estu en la Internacia Lingvo. Kaj kiel vi povos kompreni aliteranojn se vi samteranoj ne unue interkompreniĝas? Do, se vi vere dezirus ĉi tiun traktaton kun mia mondo, vi devus akiri Esperanton. Tio estas ultimato. Adiaŭ. Ni revenos post kvin jaroj por esplori kiel vi reagis al ĝi.

(Eliras)

D: Mirinde.

E: Sep mil jarojn!

B: La homaro jam ekzistis pli longe.

A: Kiel tio koncernas la aferon?

D: Mi ne scias kial, sed mi sentas, ke tiu nombro iel gravas ekster ĝia fakta kunteksto.

A: La antikvuloj konsideris sep kiel simbolo signifan nombron. Iuj el ili ankaŭ estis obsedataj de la ideo, ke la historio daŭros sep mil jarojn. Eble estas io simbola pri tiu aĝo.

B: De estulo naskiĝinta sur alia planedo?!

C: Mi ne certas, ke ni pravas opiniante lin alimondano. Laŭ mi li estas nur la produktaĵo de niaj troŝarĝitaj cerboj. Ĉu vi ne ankaŭ sentis, ke tio nur estis sonĝo?

Prez.: Sonĝo? Ne, mi ne konsiderus lin nura sonĝo.

E: Kio do?

Prez.: Se vi preferus nomi lin alie ol li mem, mi povus proponi ion al vi. Li realas, tiom kiom ni. Ne, sinjoroj, lin ne nomu sonĝo. Tio estis via.... vekhorloĝo! La sonĝa pasinteco jam finiĝis. Antaŭ vi kuŝas la reala vivo de la estonteco.

Edwin de Kock

Branĉo: Originala Poezio

Kvar Sezonoj de la Koro

2-a premio

I SOMERA NOKTO

*Mi dormeme kuŝas lite,
kvazaŭ fiŝ' en blanka sonĝo,
de la luno dorlotite
ĝis la transtegmenta plonĝo
lantsubite glutis ĝin.
Mi nun aŭskultas la tenebron,
kaj ĉiu plankoknar' aŭ pin'
eĥigas plaŭdan sangofebzon.
La koro horojn fortamburas,
ritmas kvazaŭ mar' sur rokoj.
Pensoj sur la bordoj kuras,
brue, kun mortantaj voko.
Min perturbas tiu vasto
batanta en la propra sin' —
la kosmo kvazaŭ mia gasto —
ĝis la dormoflus' forportas min.*

II AŬTUNA POSTTAGMEZO

*Foliolange
arboj flustras,
korosange
karno flustras
pri la aŭtuno.
Kalviĝas arboj
antaŭvente.
Mi kalviĝas*

*mortosente,
malgraŭ la suno.
Atendi torturas
dum sablo de l' nuno
pretersusuras,
malgraŭ la suno.*

III VINTRA MATENO

*La vintrobesto glacispire
stratojn kaj en kortoj snufas,
levante paperbulojn gire;
forgalope eke hufas
trans kampojn de la frosta koro,
el kiu frapas ĝi martele
ĝemojn de la tempdoloro
duriĝanta sendegele.*

IV PRIMAVERE

*Miaj verdaj printemppensoj
freŝe ekfolias
sub liutaj ventkadencoj.
Voĉoj en mi krias,
arĝentarpeĝoj de la koro,
ke konvolucias
en ĉiu tigo de la sensoj,
post la jaroj senodoro,
jubilonta flava floro.*

Edwin de Kock

Ĉo-San, Malgranda Japano Pupeto

3-a premio

*Estu feliĉa,
ke nur el nerompebla
drato
via korpo tro febla,
Ĉo-San malgranda.
Povus jam eta
karesa tenero kaj
flato
frakasi ĝin per tenta
ektuŝo franda.*

*Estu feliĉa,
ke vian haran nigron
oni fiksas
per stebo tro densa,
Ĉo-San pupeto.
Tial malicaj
birde viglaj fingroj
ne riskis
eĉ morton intencan
en ties reto.*

*Estu feliĉa,
ke nure en ĉifonon
nudon
vian oni vestis,
Ĉo-San lulinda.
Povus tremeta
mano malligi zonon.....
Ludon
ne tian intencis
ja la doninto.*

*Estu feliĉa,
ke ne el vakso sigela
modelis oni,
Ĉo-San, la partojn
de korpeto via.
Malgraŭ delico
promesus ja apenaŭ
por vi
la daŭran bonfarton
rigardo pasia.*

Jožko Staněk

Volapük kaj Esperantologio

(Vidu : ESPERANTO, Majo 60, p. 86)

Mi devas korekti materialan eraron el la recenzo de Doc. Ebbe Vilborg pri mia "Eseo pri la Dinamiko de la Esperanta vortfarado" aperinta en Esperantologio II (kaj ricevebla de la aŭtoro kontraŭ 3 rpk : 8 Ave Et. Billières, Toulouse, Francujo).

Efektive la recenzinto skribas : la volapuka sufikso "-ef, menciita de la aŭtoro p. 49, ne ekzistas"!!

Nu ! ni tamen legas en la verko de A. KERCKHOFFS (vidu la bibliografion !) ke -ef estas unu el

la nedeterminitaj sufiksoj de Volapük kiuj utilas por formi nomojn aŭ konkretajn aŭ abstraktajn (apud la samfunkciaj -ät, -ed, -od, -ot). Kaj KERCKHOFFS citas du ekzemplojn, el kiuj : länef, pejzaĝo devenas de län, lando.

La eraro de Doc. Vilborg verŝajne devenas de tio, ke ne ĉiuj gramatikoj volapukaj citis ĉiujn subtilaĵojn de la SCHLEYER'a kreaĵo. Ni aldonu ke la fama Volapukisto KERCKHOFFS apartenis al tiuj, kiuj proponis kaj in-

struis iom simpligitan Volapukon. Li do certe ne aldonis novan sufikson !

Andreo Albault

KOREKTO

En la korekto de la presprovaĵoj de la maja numero de la gazeto enŝteliĝis eraro en la artikolo "Carlo Goldoni", publikigita sur paĝo 91. La unua linio tekstas "Goldoni konis tre malmulte Plaŭto kaj Terenzio" : la korekta formo estas, kompreneble, "Goldoni konis tre malmulte Plaŭton kaj Terenzion". Ni petas la legantojn afable senkulpigi la kontraŭvolan eraron.

Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

LINGVO KAJ VIVO* de Gaston Waringhien. *Esperantologiaj eseoj.* Eld. Stafeto - J. Régulo, La Laguna, 1959. 450 p. 22,5 × 16 cm. Prezo: Broŝ. 13,60 gld. aŭ 54,40 steloj. Bind. 16,— gld. aŭ 64,— steloj.

Neniu alia libro pri Esperanto lasis en mi tiel profundan impreson. Tiel abunde ĝi kontribuas al nia scio pri la historio de Esperanto, pri la deveno kaj karakterizo de elementoj kaj esencaj trajtoj de nia lingvo, pri la esenco de ĝia aŭtonomeco, pri ĝia disvolviĝo de projekto provata kaj diskutata al lingvo funkcia, pri ĝia evoluo vortara, stila, literatura, pri la sociaj faktoroj determinantaj kaj determinantaj tiun disvolviĝon kaj evoluon kaj, fine, pri la perspektivoj por plua evoluo de Esperanto en sia individueco kiel membro de la bunta familio de 2.796 diversaj lingvoj, hodiaŭ parolataj en la mondo — uzataj ĉu nacie, ĉu internacie, ĉu kiel sentesprimiloj, ĉu kiel sciokomunikiloj.

Tiel enhave ampleksa estas la libro de Waringhien. Kaj mi aldonas al timantoj de lingvistikaj analizoj, tiel korvarmiga, foje emociiga ĝi estas. Ĉia sekeco estas fremda al la plumo de nia franca erudiciulo, sed ne temperamento, ne humoro, ne eleganteco, ne verveto. Aŭ sarkasmo, kiam pri la sekvo de invito al la lingvistikaj profesoroj de Sorbono veni por observi la faktan funkcion de Esperanto dum du parizaj mondkongresoj, li devas raportiti, ke "eĉ ne unu montris la pinton de sia nazo" — aŭ post simila invito al ili ĉeesti la parizan kabaredon "La tri koboldoj", li aldonas: "eĉ ne la rebrilon de la okulvitroj de unu ni ekvidis". Timantoj de scienca pedantemo, ne timu!

Multaj iom nebulaj strukturaj eroj de Esperanto ricevas klarecon post la delikataj analizoj pri la unuaj zamenhofaj projektoj, la t.n. Praesperantoj de 1878 kaj 1882 kaj post la priskribo de la labormetodoj de Zamenhof. Ni sekvas la formiĝon de la konturoj de la Lingvo Internacia kaj kiel la eksperimenta praktika elprovado de Zamenhof en la preparaj jaroj estas decida pri kelkaj punktoj, kiuj en postaj jaroj de reformemo elvokas tiom da teoria diskutado. Tiuj analizoj ankaŭ helpas en la gravaj etimologiaj studoj pri Esperanto, kiujn faras la aŭtoro, bone ekipita kiel li estas kiel

faka lingvisto specialiĝinta en franca, latina kaj helena lingvoj, kaj bona konanto de multaj aliaj. La Fundamenton de Esperanto li prilumas ne nur komparante ĝiajn elementojn laŭforme kaj laŭsence, semantike, kun naciaj lingvoj, sed ankaŭ kun la Praesperantoj. Li pritraktas la esencon de la vortkonstrua mekanismo en Esperanto, eble la plej originala trajto de ĝia tuta strukturo, kaj trajto, kiu eble pli multe ol iu alia kontribuis al la sukcesigo de la disvastiĝo de Esperanto. Sekvas, kun plena majstreco de la aŭtoro, la detaligoj pri la grava rolo de la akuzativo en Esperanto, denove kun aludo al la praktikaj spertoj de la praesperanta eksperimentado, pri ĝia esenca signifo por la altaj kvalitoj de la lingva esprimovo, kun konkludoj, kiuj estas malproksimaj de iaj ekskursoj por la ekzistaro de la akuzativo, kontraŭe precizigante la neelĉerpeblajn stilefektajn valorojn, kiuj donas al tiu kazo rolon en Esperanto, kiu estas senkompara al ĉiuj naciaj lingvoj, kun la sola escepto, diras Waringhien, de la franca lingvo de la 11-a—12-a jarcento.

De la pli fiksiĝintaj lingvostruktureroj la aŭtoro transiras al kelkaj eroj, pri kiuj en kelkaj rilatoj ankoraŭ ne stabiĝis universala uzado — la landnomoj, la modo post malhelpi ktp, post kvazaŭ, la esperanta pasivo, k.a. La -ita-vidpunkto estas pritraktita kun fortoco, sobreco (sed kompreneble kaj feliĉe ne sen temperamento) argumentante por la zamenhofa lingvouzo kontraŭ la vidpunkto de ni kompatindaj defendantoj de la (mi kredas intencita, eble eĉ intencata) logika (ne "matematike" logika), simetria sistemo de la kunmetitaj tempoj.

Valoraj komparoj kun lingvoj tute fremdaj al la strukturo de la hind-eŭropaj lingvoj formas ankoraŭfoje la plej bonan argumenton por la aglutineca strukturo de Esperanto.

Multajn temojn de la libro mi devas, kompreneble, ĉi tie preterlasi. Sed mi ankoraŭ mencias la ĉapitrojn pri editoraj demandoj, pri neologismoj, tre gravajn ĉapitrojn pristudentajn kelkajn konkurantajn lingvoprojektojn, konkludan historian skizon de la Esperanto-movado.

Ne estas necese eldiri, ke la aperigo de ampleksa, skrupule scienca verko

pri la lingva strukturo de Esperanto, ellaborita de rekonata franca lingvosciencisto, estas grava evento. Grava el vidpunkto interna de nia movado, grava el vidpunkto ekstera, rilate al dokumentado pri nia lingvo al lingvistikaj kompetentuloj ekster nia movado. Mi opinias, rilate al la lasta signifo de la verko, ke prilaborita kaj konforme kompletigita eldono en ekz. la franca lingvo devus esti publikigata kiel taŭga monografio pri la lingvo Esperanto por ĝenerala orientiĝo al fakaj lingvistoj, el kiuj la plimulto ja havas nebulan koncepton pri nia lingvo. Kun necesaj modifoj ĝi pli taŭgas ol iu ajn alia publikigaĵo por doni bildon pri la integreco de Lingvo Internacia strukturo, funkcio, spirite.

La verko de Waringhien estas klasika de ĝia naskiĝo. Ĝi pliriĉigas la sciencon pri Esperanto per materialo ampleksa, fundamenteca kaj fidinda. Tiu ĉi libro estas unu el malmultaj ĉefverkoj de la esperantologio, de Esperanto entute kaj, mi ne dubas, ĝi fariĝos klasikaĵo ankaŭ en la digna literaturo de la ĝenerala lingvistiko.

Paul Neergaard

MEDALIONOJ* de Zofia Nałkowska. Tradukis el la pola lingvo Tadeusz Hodakowski. La enkondukon tradukis Isaj Dratwer. 112 p. 17 × 11,5 cm. 1957 Eldonejo "Polonia", Varsovio, laŭ komiso de Ĉefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando. Prezo 0,80 dol. aŭ egalvaloro. Mendebla ĉe "Ars Polona", Krakowski Przemiśle 7, Varsovio aŭ ĉe Asocio de Esperantistoj, ul. Kozia 3, Varsovio.

Tiu ĉi libro montras la dorsflankon de la homa menso. Abunda estas la literaturo pri kruelaĵoj faritaj dum la dua mondmilito. "Medalionoj" diferencas de aliaj samspecaj per sia nepartia sinteno, en la signifo ke ĝi nur raportas. Ĝuste tio impresas plej forte. Ĝi estas admona averto al ni, kiuj vivas. Ĝi estas instruo. "La Kabano de Onklo Tom" grave kontribuis al abolo de la sklaveco. "Medalionoj" devus esti legolibro deviga en ĉiuj lernejoj de la mondo kaj por ĉiuj politikistoj senescepte.

P. Zacho

POŝTMARKOJ DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO.* Kompilita de Ĉina filatela Kompanio. Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino. Aperis 1959. Prezo: 4.25 gld.

Tre, eĉ treege, bela kaj praktika albumo. Komencas per historieto de ĉinaj p.m. Tipoj de p.m. en koloroj. Miniatura folio aŭtentika. Klarigoj de ĉiuj bildoj, indeksaj numeroj, valoro, preso, truado kaj dato de emisio. Loko por estontaj emisioj. Mallonge: perfekta albumo nepre rekomendinda por la kolektantoj.

P. Zacho

Daŭrigo p. 118



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

Sub la Alta Protektado de L. M. Baŭduino, Reĝo de la Belgioj.

Oficiala Antaŭkongreso: Arnhem (Nederlando) 27-30 julio 1960. Adreso: Pontanuslaan 7, Arnhem.

16-a Internacia Junulara Kongreso: Rotterdam (Nederlando) 23-30 julio 1960. Adreso: Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

N-ro 14 Majo 1960

OFICIALA KOMUNIKO

Novaj fakkunvenoj:

Mendis fakkunvenon:

— Popoluniversitatoj: "La 3-a Internacia Kongreso de la Popol-Universitatoj". Adreso: S-ro P. Petit, 26 rue de Rochebrune, Rosny-sous-Bois (Seine), Francujo.

— Mondpaca Esperantista Movado: "Esperanto kaj la praktika laboro por la paco socia kaj internacia". Adreso: S-ro Balague, 26 Traiseng., St. Pölten, Aŭstrujo.

— Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistaj. Adreso: Ing. K. Tyminski, Górnosłaska 45, V, 24, Varsovio, Pollando.

— Internacia Komitato de Esperantistaj Virinoj. Adreso: Virina Fakto de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro, Budapest 4, Pf 147, Hungarujo.

— Eldonistoj kaj redaktoroj de Esperanto-gazetoj. Adreso: S-ro M. Jaumotte, de Bruynlaan 44, Wilrijk, Belgujo.

Baza artikolo:

Jenaj lokaj Esperanto-societoj mendis la kongresan bazan artikolon por organizi vesperojn pri Bruselo: Junula Sekcio de Krakovo (Pollando), Göttingen (Germanujo), Lund (Svedujo).

Sonbendo:

Jenaj lokaj Esperanto-societoj mendis la kongresan sonbendon: Moyà, Manresa, Sabadell, San Feliu de Codinas, Manlleu, Tarrasa, Barcelona, Madrid, Valladolid, Pontvedra (ĉiuj en Hispanujo), Köln, Münster (Germanujo), Steyr (Aŭstrujo), Zizkova (Ĉeĥoslovakio), Sofio (Bulgario), Meadville (Usono), Rio de Janeiro (Brazilo). Ĝis fino de aprilo la kongresa sonbendo estis mendita de pli ol 80 urboj en 20 landoj.

Adoptaj gepatroj:

Transprenis la "Adoptan Patrecon": Ges-oj de Vries (Nederlando), Esperanto-societoj de Borlänge kaj Linköping (Svedujo), Ges-roj Heilberg (Usono), Skota Esperanto-Federacio (Britujo), S-ino M. Vandeveld (Belgujo), S-ino Woessink (Nederlando), Karlöreĝa Esperanto-societo (Belgujo),

S-ro Van Eynde (Belgujo), Esperanto-societo de Lieĝo (Belgujo), F-ino Terriijn (Belgujo), D-ro A. K. Beck (Britujo). Ĝis fino de aprilo la "Operacio Adoptaj Gepatroj" kolektis 18.300.- b.fr. Al ĝi aliĝis 45 individuaj esperantistoj kaj Esperanto-societoj. Tri aliaj infanoj el Finnlando estas invitataj veturi gaste al Bruselo por partopreni en la 5-a Internacia Infana Kongreseto.

Fervoja rabato:

La 25% rabato de la belgaj fervojoj estas valida de kvin tagoj antaŭ la Kongreso ĝis kvin tagoj post ĝia fermo. La rabato estas ricevebla je prezento de la speciala rabatkarto, sendita al ĉiu partoprenonto kun la Dua Bulteno, sur kiun la kongresano devas nepre aldoni sian nomon kaj adreson.

Gvidataj vizitoj:

La Loka Kongresa Komitato organizas jenajn fakvizitojn en Bruselo:

1. Muzeo de Belaj Artoj

La Muzeo de Antikva Arto en Bruselo enhavas i.a. grandan kolekton de la majstroj de la antaŭaj Malaltaj Landoj de la VIII-a, XI-a, XV-a, kaj XVI-a jarcentoj, salonojn de flandraj, francaj kaj nederlandaj primitivaj pentristoj de la XIV-a kaj XV-a jarcentoj, kaj italajn, germanajn, francajn kaj hispanajn pentraĵojn. La Muzeo posedas, i.a. plurajn Bosch, Memling, Breughel, Frans Hals, Van Dyck, Gérard David, Mesys: apartaj salonoj estas dediĉitaj al Rubens kaj al Jordaens. Gvidos la viziton Doktorandos F. Roose el Bruĝo.

2. Banko de Bruselo

La konstruaĵo de la "Banque de Bruxelles", kiu situas en la kadro de la Reĝa Placo, estas interesa el duobla vidpunkto de ĝia arkitekturo kaj de ĝia labororganizo profesia. Iama patricia rezidejo de la XVII jarcento, la palaco konservis sentuŝe siajn originalajn stilon kaj dekoraciojn: honora korto kaj pompa marmora ŝtuparo, vitraĵoj, tapiŝoj kaj tapetaĵoj riĉigas antikvajn salonojn kaj artoverkojn. La Banko posedas la unuajn aŭtogiĉetojn de Eŭropo, kie la aŭtomobilistoj efektivas la operaciojn sen forlasi la veturilon kaj kie la kontroloj estas farataj per televido. La vizito estas organizita de S-ro J. Oleffe, bankfunkciulo kaj kasisto de L.K.K. La vizito estas interesa por bankoficistoj kaj artamantoj.

3. Meĥanikigita Poŝtoŭicejo

La Poŝtadministracio de Bruselo centrigis siajn dispartig-servojn en meĥanikigita komplekso proksime al la plej grava stacidomo de Belgujo. Por ekipi la necesan konstruaĵon oni ima-

gis vertikalajn meĥanismojn kunligitajn kun horizontalaj sistemoj. Ĉiu operacio rilatanta al korespondado, inkluzive de la transporto de la sako al aŭ el la stacidomaj peronoj, okazas aŭtomate. 90.000 leteroj estas traktataj ĉiuhore. La tuta reto, ekipita per optika signalaro, estas videbla ankaŭ de ekstere, ĉar la eksteraj vandoj de la palacego estas el vitro. La meĥanikigita poŝtoŭicejo de Bruselo estas la plej moderna en Eŭropo.

Aliaj vizitoj estos anoncitaj en venontaj komunikoj. Interesuloj estas petataj anonci sian partoprenon per simpla poŝtkarto al la Kongresa Oficejo.

Senpaga partopreno:

La Esperantista Societo de Liono (Francujo) disponigis, kiel stipendion al sia plej bona lernanto, senpagan partoprenon en la Universala Kongreso de Bruselo.

Lasta aliĝdato:

La Loka Kongresa Komitato akceptos aliĝojn por la Universala Kongreso nur ĝis la **30-a de junio 1960**. La lasta limdato por mendi kaj antaŭpagi ĉe L.K.K. loĝadon kaj ekskursojn estas same la **30-an de junio 1960**. Post tiu dato la Kongresa Komitato ne garantias loĝigon por la malfruintoj.

Unuaj laboroj:

La Internacia Infana Kongreseto kaj la Somera Universitato estos malfermitaj jam sabaton posttagmeze, la 30-an de julio 1960.

Akcepto de la alvenintoj:

La akcepto de la kongresanoj je alveno en Bruselo estos zorgata nur en la Centra Stacidomo, kie en la unuaj tagoj funkcios konstanta akceptejo.

Statistiko:

(ĝis fino de aprilo) Alĝerio 4, Antiloj 1, Arabio Unuiĝinta 1, Argentino 1, Aŭstrujo 18, Aŭstralio 4, Belgujo 222, Brazilo 4, Britujo 174, Bulgarujo 9, Ĉeĥoslovakio 1, Cejlono 1, Danlando 42, Finnlando 18, Francujo 210, Germanujo 172, Grekujo 1, Hispanujo 14, Hungarujo 12, Irlando 2, Italujo 84, Japanujo 3, Jugoslavio 52, Kongo 2, Meksiko 1, Monako 6, Nederlando 194, Norvegujo 15, Novzelando 7, Pollando 73, Portoriko 1, Rumanujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 70, Svisujo 28, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 9, Israelo 1, Indonezio 1, Portugalujo 2. Entute 1465 kongresanoj el 41 landoj.

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

DANKESPRIMO

Okaze de nia geedziĝo, tre granda nombro da geesperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo sendis al ni telegramojn kaj mesaĝojn de bondeziroj. Ĉar estas neeble al ni respondi aparte al ĉiu, ni deziras ĉi tie esprimi al niaj multaj geamikoj, kiuj kun ni ĝojis kaj spirite festis, nian plej sinceran dankon.

Ada kaj Gian Carlo Fighiera

Helpite de la S-roj Andreo Ĉseh kaj T. Morariu li fondis Centron de Esperanto, disponigis por tiu celo domon kun presejo, ejo por kursoj, biblioteko, vendejo kaj eldonis kelkajn librojn. Li estis ano de la Lingva Komitato kaj de la Akademio dum 50 jaroj.

La 27/4 1960 mortis en Luhačovice, Ĉeĥoslovakujo, pensiita direktorino de mezlernejo **S-ino Marie Hartmanová-Haváfrnková**. Malnova esperantistino, kiu multe propagandis per kursoj, prelegoj kaj ankaŭ dum siaj vojaĝoj, precipe en Nederlando, kie ŝi prelegis kaj prezentis ne nur sian patrujon, sed ankaŭ la muzikarton de la ĉeĥoslovaka nacio.

S-ro V. Pinagel, Unkel (Rhein), dumviva membro kaj veterano, mortis en la aĝo de 84 jaroj.

D-ro J. Bremon, la kataluna pioniro kiu estis vicprez. de la UK en Barcelona, 1909, forpasis la 21an de aprilo ĉijare, en la aĝo de 75 jaroj. Li multe laboris por Esperanto, lastatempo per eldono de sia konata gramatiko de Esperanto por hispanlingvanoj. En la unika gramofondisko, kiu ekzistas kun la voĉo de Zamenhof, la kunparolanto estas D-ro Bremon.

La 7-an de aprilo 1960 entombiĝis **S-ro Godicl Rudi, Jugoslavio**, kiu estis tre estimata kaj progresema pedagogo. S-ro Godicl Rudi multe suferis dum la milito, sed dum la lastaj 8 jaroj li estis direktoro de mezlernejo en Rogaška Slatina. Post mallonga tempo li ellernis Esperanton kaj plenumis la A, B kaj C - ekzamenojn, kaj tuj li enigis Esperanton en la instruplanon kaj tiamaniere multe helpis al la Internacia Lingvo.

S-ro Kormos Jenó, Rumanujo, mortis post longdaŭra kormalsano. S-ro Kormos Jenó estis esperantisto ekde 1927 kaj de tiu tempo li fervore kaj sindone laboris por la Internacia Lingvo. Li tradukis kelkajn librojn de sia nacia lingvo en Esperanton.

La 18-an de Marto 1960 tute neaten-dite mortis en Londono en la aĝo de 57 jaroj **K. R. C. Sturmer**, internacie konata kiel serioza recenzisto de Esperantaj libroj kaj literatura kritikisto. En siaj "rimportretoj" Kalocsay karakterizis lin tiel:

K. R. C. Sturmer La Timata.

Poetojn manĝas dekduope,

Kritikdekretas episkope

Sur sia tron' aŭtoritata

Inter aliaj meritoj estas menciinda lia sukcesa iniciato enkonduki Esperantajn kursojn — kun normala pagado de la instruanto — inter la vesperkursoj de la Londona "County Council".

La Kvakera Esperantisto, Printempo 1960, n-ro 24, aperis. Prezo 1 ŝilingo.

Centenario de Zamenhof, eldonita de La Liga Argentina de Esperanto. La artikolo de Prof. E. Privat pri D-ro L. L. Zamenhof tradukita en hispanan lingvon. La broŝuro ampleksas 18 paĝojn, 23 × 17 cm. Portreto de D-ro L. L. Zamenhof beligas la kovrilpaĝon.

Korespond-amikoj por Paco per Esperanto, eldonita de La Societo de Internaciaj Korespondamikoj, Japanujo. Amplekso: 28 paĝoj, 21,5 × 15 cm.

Broŝuro enhavante multe da nomoj kun fotoj de gejojanoj (ankaŭ infanoj), kiuj deziras korespondi kun eksterlandanoj. La broŝuro estas havebla ĉe: SIKa, 1432, Mamiŝidami, Morijama-ŝi, Aiĉiken, Japanujo.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropo tempo oni aldonu unu horon.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la aprilan numeron.

Radio Roma. 3-VI, la Internacia Specimenfoiro de Milano; 7-VI, Tra la literaturo; 10-VI, Leterkesto kaj Bibliografio; 14-VI, la itala verkisto Orio Vergani; 17-VI, Novaĵoj el Italujo; 21-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-VI, la socia poezio de Ada Negri; 28-VI, Sankta Vincento de Paul; Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 2-VI, Mozaiko-kuriozaĵoj; 9-VI, Muzika promeno tra Kroatujo; 16-VI, Recenzoj pri la novaj beletraj verkoj; 23-VI, Pri la jugoslavia filmo; 30-VI, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado.

Pola Radio nun elsendas sur la jenaj ondoj: 249 m. (1205 kcs), 42.11 m., 31.50 m., 31.45 m., 30.69 m., 25.39 m., 25.20 m., 25.09 m., ĉiutage; sama horo: 15.30 GMT.

Radio I.B.R.A. (Stockholm) provizore ne plu elsendas.

Brazila Radio. Pri ŝanĝoj vidu la majan numeron.

Voĉo de Ameriko elsendos tri programojn en Esperanto la 24-an de Junio, la 1-an kaj la 8-an de Julio je 11.00 per ondoj 41,90 m, je 12.00 per ondoj 19,72 m, je 22.00 per ondoj 31,19 m kaj 25,22 m. Raportojn kaj opiniesprimojn oni sendu al D-ro W. Solzbacher, Voice of Amerika, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de majo 1960

N-ro 327

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aprilo kaj ankaŭ por komparo je la fino de aprilo 1959:

	1959	1960
Asociaj membroj	5467	5750
Individuaj membroj		
MJ	689	655
MA	4585	4400
MS	472	501
Pat.	7	5
DM	336	351
HM	46	40
JMJ	22	22
JMA	144	163
	6301	6137
	11768	11887

DELEGITOJ

Germanujo

- Elmshorn** (24b) (Holstein) FD (masonistaj aferoj): S-ro Adalbert Masuhr, Hainholz 45.
- Fulda** (16) (Hessen) FD (turismo): S-ro Heinrich Funk, komercisto (emerita), Haimbacher Str. 35.
- Hildesheim** (20a) (Niedersachsen) D: S-ro Karl Richter, instruisto, Kardinal-Bertram-Str. 27.
- Kreuth b. Tegernsee** (13b) (Bayern) FD (filatelo St. Gabriel): F-ino A. M. Orterer, administraci-salajristino, Rathaus.
FD (turismo): la FD (filatelo St. Gabriel).
- Moenchengladbach** (22a) (Rheinland) FD (vegetarismo): S-ro T. W. Teich, librovendisto kaj instruisto, Postfach 121.
- Neustadt** (22b) (Rheinland-Pfalz) FD (fervojo): S-ro Reinhold Ritthaler, fervojisto, Waldstr. 107.
- Oldenburg** (23) (Niedersachsen) JD: S-ro U. J. Moritz, studento, Am Festungsgraben 53.
- Regensburg** (13a) (Bayern) FD (fervojoj): S-ro Erhard Redlich, ĉeftrajnestro, Bischof-Konradstr. 14.
- Rheydt** (22a) (Nordrhein) FD (fervojoj): S-ro Wilfried Mester, fervoja oficisto, Eisenbahnstr. 16.
- Stotzheim Kr. Euskirchen** (22c) (Nordrhein-Westfalen) D: S-ro Ernst Kind, ekspozoficisto, Hauptstraße 72.
- Versbach über Würzburg** (13a) (Bayern) D: D-ro E. J. Feist, registara konsilisto, Gartenweg 7.
- Westerland** (24b) (Sylt) FD (muziko: akordiono): S-ro Berthold Fischer, fakinstruisto, Am Seedeich 28a.
FD (stenodaktilografado): la FD (muziko).
- Würselen** (22c) (Nordrhein-Westfalen) D: S-ro R. P. Laufen, studento de kat. teol., Kaiserstraße 138.
FD (religio-katolikismo): la D.

Hispanujo

- Madrid** FD (fabrikado): S-ro Felix Gomez Martin, mekanikisto, Fernando Gabriel, 1 - 4^o izqda.

Hungarujo

- Budapest** FD (pedagogio): D-ro Istvan Szerdahelyi, mezlerneja profesoro, Szigetvári u. 22.II.4.
FD (teozofio): D-ro Károly Mócsi, advokato, nun elektr. muntisto, Övutca 116.

Italujo

- Bologna** FD (modo): S-ino Lina Bartolini-Bifulco, Piazza 7 Novembre No. 6.
- Castellazzo Bormida** (Alessandria) D: S-ro Giuseppe Carassa, pensiulo, Via XXIV Maggio No. 13.
- Firenze** (korekto): D ne vakas (kiel erare indikite en maja numero).
- Napoli** FD (instruado): S-ro Enrico Mingo, instruisto, via Simone Martini 22.
- Parma** FD (medicino): D-ro Luciano

Redenti, kuracisto, Via Parmigianino 11.

Sciacca (Agrigento) FD (juro): D-ro Vincenzo Lupo, kanceliero ĉe tribunalo, Via Mons. D'Agostino.

Torino FD (juro): D-ro Attilio Vaona, advokato, Via Lodovica 17.

Japanujo

Kakogawa-si (Hyogo-Ken) D: S-ro Rintaro Taki, direktoro de kompanio, Befu.

Mozi-si (Jukuoka-Ken) D: S-ro Itaru Ooba, komercisto, Dai-ri-Nisi Sinmati.

Okayama (Okayama-Ken) FD (medicino): D-ro Ichiro Arata, kuracisto, 25 Kawasaki-cho.

Takaoka (Toyama-ken) D: S-ro Masao Kakuo, instruisto, Moriyama-tyô.
FD (instruado): la D.

Tokio FD (komerco): S-ino Yukiko Isobe, komercistino, 4-2134 Siinamati, Tosima-ku.

Jugoslavio

Beograd (Srbija) FD (radio-tekniko): S-ro Jevrem Stefanović, oficisto, Đure Đakovića 29.

Kaštel-Novi (Dalmacija) D: F-ino Stajka Cetinčić, ul. Palih-Boraca 30.

Kumanovo (Makedonija) D: S-ro Petar Nikolovski, studento, Str. Đure Đakovića 5.

Novi Sad (Vojvodina) FD (financoj): S-ro Ivan Andrejević, financa inspektoro, Alekse Šantića 21/II.
FD (komerco): S-ro Dušan Jeneckov, ŝtata oficisto, Jovana Boškovića 2/II.

Skopje (Makedonija) FD (juro): S-ro Đorđi Marjanović-Đukovski, studento de juro, ul. 55 br. 38.

Zagreb (Hrvatska) FD (radio): S-ro Vlado Jurković, teknika reĝisoro, Radio-Televido Zagreb, str. Šubićeve 20.

Zrenjanin (Vojvodina) FD (librotenado-fervojo): S-ino Gizella Šoponjai, librotenistino, strato Novosadska N-ro 42.

Kanado

Montreal (Quebec) FD (urba arkitekturo): S-ro Louis A. Derno, arkitekto, 3229 Lacombe Ave.

Malto

Qormi D: S-ro Carmel Mallia, instruisto, 1, Alley 1, St. Catherine Str.

Nederlando

Amsterdam W-2 FD (kompostado): S-ro A. W. Withoos, maŝinkompostisto, Thomas à Kempisstraat 46.

Eindhoven (N.-B.) D: vakas.

Heiloo (N.-H.) FD (katolikismo): vakas.

Norvegujo

Orkdal (Sør-Trøndelag) D: S-ro Olav Metli, Follo, Orkanger.

Nov-Zelando

Wellington D: vakas.

FD (telefonio): vakas.

Pollando

Bytom (Górny Śląsk) D: S-ro Władysław Burszta, inĝeniero, ul. Moniuszki 16.

Gdańsk-Wrzeszcz FD (turismo): S-ro Jerzy Michalik, oficisto, Szeroka 17 m. 5.

Gliwice (Górny Śląsk) D: S-ro Stanisław Pęksa, mgr. inĝ. kemiisto,

Kościuszki 2/5.

Jarosław (woj. Rzeszów) D: S-ro Jakub Makara, katol. sacerdote, ul. Kraszewskiego 14.

Jelenia Góra (Dolny Śląsk) D: S-ro Tyburcjusz Tyblewski, instruisto, poŝkesto 49.

FD (instruado): la D.

Lublin FD (medicino): S-ino Danuta Tyszlukiewicz, kuracistino, ul. Weteranów Nr. 34/2.

Nowy Sącz (woj. Kraków) FD (lingvistiko): S-ro Tadeusz Hodakowski, mezlerneja instruisto, Kościuszki 26.

Puławy (woj. Lublin) D: vakas.

Portugalujo

Lisboa (Estremadura) FD (muziko): S-ro Artur Hipácio Reis e Santos, funkciulo, R.S. João da Mata 61/4^o.

Sovet-Unio

Moskva FD (filozofio/marksismo): F-ino Vera Zlotnikova, studentino, B. Ekaterinskaja 18/20, kv. 25, Moskva I-110.

Tallinn (Estonia S.S.R.) VD: S-ro Jaan Ojalo, fakestro de kooperadligo, str. Narva 27-5.

FD (kooperado): la VD.

Usono

Cicero (Illinois) D: S-ro Frank J. Rosner, ĵurnalistino, 2325 S. 61st Avenue.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1960

- 411 Cochrane, F-ino I. M., Dunfermline, Britujo.
- 412 Dodd, S-ino M. C. E., London, Britujo.
- 413 Hilder, S-ro Edward C., Bideford, Britujo.
- 414 Hockey, F-ino M. J., Barrow-in-Furness, Britujo.
- 415 Ison, F-ino H. M., Colchester, Britujo.
- 416 Morton, F-ino H. R., London, Britujo.
- 417 Shaw, S-ro F. W., Wistaston, Britujo.
- 418 Toms, S-ro C. H., Freshwater, Britujo.
- 419 Su, S-ro Armand, Tientsin, Ĉinujo.
- 420 Gaillard, S-ro A., Paris, Francujo.
- 421 Jourdan, S-ino J., Aix en Provence, Francujo.
- 422 Maczkowski, S-ro, Arles sur Tech, Francujo.
- 423 Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo.
- 424 Bitterling, D-ro Horst, München, Germanujo.
- 425 Dreger, S-ro Alexander, Recklinghausen, Germanujo.
- 426 Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo.
- 427 Köhne, S-ro Heinrich, Göttingen, Germanujo.
- 428 Michalik, S-ino Frieda, Hösel, Germanujo.
- 429 Oeste, S-ro Wilhelm Th., Köln, Germanujo.
- 430 Schumacher, F-ino Margarete, Hildesheim, Germanujo.
- 431 Freixas, S-ro José Ventura, Tarrasa, Hispanujo.

- 432 Perarnau, S-ro Jaime, Tarrasa, Hispanujo.
 433 Adžić, S-ino Prof. Nada, Vinkovci, Jugoslavio.
 434 Borjanović, S-ro Mirko, Opžaci, Jugoslavio.
 435 Smilga, S-ro K., Toronto, Kanado.
 436 Bourgeois, S-ro Maurice, Tanarive, Madagaskaro.
 437 Rousseau, S-ro Henri, Tanarive, Madagaskaro.
 438 Gorbatoŝ, S-ino, Oujda, Maroko.
 439 Hug, S-ro R., Casablanca, Maroko.
 440 Jung, S-ro Teo, Scheveningen, Nederlando.
 441 Praag, Mag. D-do I. van, Bentveld, Nederlando.
 442 Armanis, S-ro Andrejs, Lier, Norvegujo.
 443 Jensson, S-ro Arnfinn, Oslo, Norvegujo.
 444 Nesje, S-ro Hans, Aalesund, Norvegujo.
 445 Rian, S-ro Peter, Skogns Markabygd, Norvegujo.
 446 Stjernesund, S-ro Einar, Lilleström, Norvegujo.
 447 Allan, S-ro James T., Wellington, Nov-Zelando.
 448 Freeth, S-ro R. M., Palmerston North, Nov-Zelando.
 449 Andjans, S-ro Janis, Riga, Sovetunio.
 450 Dickson, S-ino Margaret E., Cape Town, Sud-Afriko.
 451 Colliander, S-ino Martha, Stockholm, Svedujo.
 452 Emson, S-ino Regina, Borås, Svedujo.
 453 Gustafson, S-ro Nils, Hällabrottet, Svedujo.
 454 Johansson, F-ino Ethel, Hedemora, Svedujo.
 455 Lindeberg, S-ino Britta, Malmö, Svedujo.
 456 Persson, S-ro L., Häradsbygden, Svedujo.
 457 Söderlund, S-ro B., Kumla, Svedujo.
 458 Sennhauser, F-ino, Basel, Svislando.
 459 Chobanoff, D-ro Stefan, Lanham, Usono.
 460 Harris, S-ino S. E., Mattoon, Usono.
 461 Pollock, S-ino Myrna, Pacific Palisades, Usono.
 462 Tobusch, S-ro Herman, Chicago, Usono.
 463 Pich, S-ro Jozefo, Kaltenleutgeben, Aŭstrujo.
 464 Wick, S-ro Rudolf, Pols ob Judenburg, Aŭstrujo.
 465 Boffejon, S-ro Hector, Brasschaet, Belgujo.
 466 Schleicher, S-ro Ib, København, Danlando.
 467 Zacho, S-ino Birthe, Brønshøj, Danlando.
 468 Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo.
 469 Brunet, S-ro Paul, Valenciennes, Francujo.
 470 Goppel, S-ro Ludwig, Regensburg, Germanujo.

- 471 Circulo Mercantil, Málaga, Hispanujo.
 472 Pölöskey, S-ro Árpád G., Budapest, Hungarujo.
 473 Ólafsson, S-ro Ingimundur, Reykjavik, Islando.
 474 Nurra, S-ro Gavino, Carbonia, Italujo.
 475 Pacelli, Prof. Giuseppe, Pisa, Italujo.
 476 Vaona, D-ro Attilio, Torino, Italujo.
 477 Whitworth, S-ro Albert, Thorold, Kanado.
 478 Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Nov-Zelando.
 479 Denniston, S-ino G., Alexandra, Nov-Zelando.
 480 Ferguson, S-ro A. L., Auckland, Nov-Zelando.
 481 Todd, S-ro C., Auckland, Nov-Zelando.
 482 Amaral, S-ro Inđ. Hugo, Funchal, Portugalujo.
 483 Rego, S-ro M. Lopes do, Lisboa, Portugalujo.
 484 Sales, S-ro Alfredo L., Leiria, Portugalujo.
 485 Bernhardt, S-ro Werner, Honiara, Salomon-Insuloj.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

- Kirtz, F-ino Germaine, Mulhouse, Francujo.
 Goldman, S-ro Michael S., East Islip, Usono.

PATRONOJ

4. Goldman, S-ino Teuntje, Washington, Usono.
 5. Goldman, S-ro Thomas A., Washington, Usono.

HEREDA DONACO

Post la forpaso de nia longjara dumviva membro **S-ro Luis Santamarina** en Hispanujo, atingis nin la informo, ke tiu bedaŭrata fidela esperantisto herede donacis al UEA la sumon de 1000 pesetoj. Ni alte taksas tiun mal-avaran geston de subteno de la movado eĉ trans la tombo.

Laŭ la Regularo la sumo eniros la kapitalan konton de UEA kaj la ago de Sinjoro Santamarina estos enskribita en la Ora Libro de la Asocio. Ni ĉiam dankeme rememoros la nomon de la donacinto.

FONDAĴO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18.212,07 gld.
 Ernst Majtanic, Aŭstrujo 1.45 gld.;
 G. De Boes, Belgujo 2.23 gld.; Ludwig Goppel, Germanujo 22.56 gld.; D-ro Adacio V. Araujo, Portugalujo 6.61 gld.
 Entute 18.244,92 je 1.5.1960.
 Donacu unu milonon — aŭ pli ! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo ! Ankoraŭ ne ĉiuj elspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj.

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro Charlet, Francujo 5.39 gld.; S-ro A. Hughes, Usono 11.65 gld.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro David G. Hill, Britujo 2.64 gld.;

S-ro Gustav R. Johanson, Svedujo 0.62 gld.; S-ro Roland Barta, Usono 2.81 gld.
 Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

LA POŝTMARKOLEKTADO

Statistiko la unuan de junio :
 4000 steloj = 1000 gld. Sendu daŭre al

Peter Zacho, Randbølvej 4,
 Kopenhago F.

ANONCETOJ

Belga Turista Servo : Ĉian informon turistan prizorgas R. Loeckx, Konijnenperken 109, Bruselo 17, Belgujo, kontraŭ respondkuponon. Modesta ĉambro ekde 50 F. en Bruselo-Centro havebla. Tel. 723222.

Simpatiantoj de "dovrasoleismo" estas kore invitataj pasigi ferion ĉe la angla landlimo kun Eŭropo. Fonduso por aĉeti unuan domon staras je £ 14.64. Vin turnu al D. Soleo, Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri : kio en E estas facila por vi, kio ne ! Kio plaĉas al vi, kio ne ! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj formado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332 ! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp.-kuponon. Adresu : Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Kristana Bulteno, monata gazeto de liberala religio, nun estas en sia kvina jaro. Jarabono \$ 1.50; provekzemplero senpage. Adreso : Donald Broadribb, Collins, N.Y., Usono.

Avri Salamon, Kiryat-Motzkin, P.O.B. 8 (Israelo), deziras tutmondan poŝtmark-interŝanĝadon. Aŭfranku filatele ! **Gvidlibreto** praktika, informriĉa : De Parizo al Lazura Marbordo 1.80 NF = 4 rpk. M. Rétot, 162 Boulevard A. Briand, Montreuil (Seine), Francujo. Poŝtkonto : Paris 1042-07.

Historiisto korespondas kun samideanoj en Portugalujo kaj Brazilo pri historiaj temoj enlandaj kontraŭ informoj pri brita historio. N. Page, 7 Marlborough Place, Banbury, Britujo.

Mi preparas prelegon pri internacia folkloro kaj mi bezonas gramofondiskojn kun folkloro muziko kaj kantoj (45 aŭ 33 rpm.). Interŝanĝe mi sendos hispanajn diskojn aŭ alian aĵon. Faru sendojn al: R. Molera - Str. Hospital 13, Moya (Barcelona), Hispanujo.

Du teknikistoj deziras korespondi p.ĉ.t., k.ĉ.l. interŝanĝi pk., pm, b.k. kaj gramofondiskojn. 1. Petrović Miodrag, Z.P. Partizani (Arandjelovac), Jugoslavio. 2. Premović Veljko, Šipolje. Kos. Mitrovica, Jugoslavio.

Sendu 50, 100 aŭ oble, vialandajn poŝtmarkojn, kaj vi ricevos saman kvanton da skandinaviaj. Bengt Sjöberg, Strandvägen 24 A, Karlstad, Svedujo. **Deziras korespondi** kaj interŝanĝi belajn bildkartojn, ilustritajn revuojn kaj gramofondiskojn kun gesamideanoj el la tuta mondo. Stojan Kocovski, Ul Pero Ĉiĉo No. 43, Kumanovo, Jugoslavio.

Juna jugoslavia samideano deziras

korespondi kun la tuta mondo. Adreso: Miloš Cvejić, Ul 16 februara No 47, Kuršumlija, Srbija, Jugoslavio.

Novhebrea lingvon deziras lerni per korespondado kun israelano: A. Gentner, Augsburg, Augsburger Str. 37, Germanujo Okcidenta.

La Epernay-a Grupo dankegas ĉiujn, kiuj sendis ion por letervespero, kiu estis granda sukceso.

La Ludo-ĉambro bezonas helpant(in)on, kiu flue parolas Esperanton. Estas ĉi tie ebleco studi samtempe praktikan pedagogion. Oni ricevas loĝejon, vegetaran krudmanĝaĵon kaj poŝmonon; se la persono scias mastrumadon, la salajro estas plialtigita. Bonvolu turni vin al: Karen Bjørnsby, Hartmannsvej 23, Hellerup, Danlando.

Mi deziras korespondi kun junaj (ĝis 35 jaroj) geesperantistoj el Japanujo, Aŭstralio, Tajlando, Egiptujo kaj Cejlono. Estas 22-jara kaj min interesas ilustritaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj.

Kiu volas skribi al mi? Maria Steyer, Rotebergstr. 3, Kelkheim i/Ts, Germanujo/Okc.

11-12-jaraj geknaboj (komencantoj) deziras korespondi kun tuta mondo per simplaj leteroj aŭ bildkartoj. Adreso: La Junaj Esperantistoj, Mairehau School, Christchurch, Nov-Zelando.

William Auld, antaŭe en Johnstone, informas siajn korespondantojn, ke ekde la 15a de majo lia adreso estas: 35 Deer Park, Sauchie, ALLOA, Skotlando.

Dirk M. Brink, antaŭe en Los Angeles, informas ke lia privata adreso estas nun: 6 B, Shouson Hill, Hongkong.

Donu impulson al mia nova grupo sendante poŝtkartojn, turismajn prospektojn kaj leterojn al f-ino Sidorak, Kamienica 167, k/Bielska-Biala, woj. Katowice, Pollando.

Korektu en Jarlibro 1960, paĝo 410 ĉe Nice: merkrede anstataŭ sabate.

Unesco Courier

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

**publikigis en sia numero de decembro
1959 grandan artikolon pri Zamenhof**

Tiu numero en **angla, franca, hispana aŭ
rusa** lingvo estas ricevebla ĉe la landaj
U.N.E.S.C.O.-instancoj kaj ĉe U.E.A.

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj.

Prezo: inkl. sendkostojn: 0,50 gld; 2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan lingvon!

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanta teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO.

Mendu ĉe UEA!

Prezo: 4 int. resp. aŭ egalvaloro por la tuta serio.

Ankoraŭ havebla ĉe U.E.A.

TITO

Biografio verkita de **V. Dedijer** en la traduko de
Mason Stuttard

Bonega lingvo kaj stilo.

Prezo: 11.— gld; 44 steloj.

ALIĜU AL LA

45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Bruselo: de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto)

Lasta limdato: la 30-an de junio 1960

Aliĝu al la Cseh-Seminario!

Partoprenu en la Oratora Konkurso!

Ekzameniĝu okaze de la Internaciaj Ekzamenoj!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :
En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

FERIAJ KULTUR-SEMAJNOJ

Esperanto kaj Geonismo

KASTELO MÜNCHENWILER

apud MURTEN-MORAT, Svislando

7-21 aŭgusto 1960

Dir : D-ro W. Perrenoud, Prof.
Prospekto kaj informoj : Svisa Esperanto-Instituto
Breitenrainstrasse 12, BERN

Oficiala Bulteno

DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

N-ro 2 aperis kaj enhavas artikolon de la prez.
Inĝ. J. R. G. Isbrucker :

"Pri la Vortfarado en Esperanto".

Disvendas U.E.A. Prezo : 1,50 gld., 6 steloj.

"Esperanto"

Havigu al vi la bele binditan volumon de la
Zamenhof-Jaro !

Bindita Jarkolekto 1959 : 9.— gld.; 36 steloj.

Por ind. membroj 1959 : 4,50 gld.; 18 steloj.

Mendu ĉe U.E.A. !

100

eksterordinaraj ekzempleroj

de la

MEMORLIBRO

numeritaj kaj subskribitaj de la Prezidanto
kaj Sekretario de I.O.K. kaj U.E.A.

estos riceveblaj
je la prezo de po 25.— gld.,
100.— steloj

**POR ESTI UNU EL LA FELIĈAJ
POSEDONTAJ DE TIU RARAĴO
MENDU ĜIN TUJ ĈE U.E.A. !**

N.B. Pro la decido de UNESKO kaj ĝiaj aten-
dataj sekvoj la Memorlibro aperos pli
malfrue ol estis planite. Kontraŭe al la
informo sur p. 19 de Jarlibro 1960 ĝi do
estas ankoraŭ aperonta. La antaŭmen-
dintoj ne estu maltrankvilaj !

Retoriko

kun aparta konsidero al esperanta parolarto
de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo : 11.— gld. bindita


44.— steloj

9.— gld. broŝurita

36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.



Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam